

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*



*La monda esperantistaro amase, digne kaj gaje festis  
la 150an jubileon de la iniciatoro de la Internacia Lingvo*

2010

2

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2010. №2 (184)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2010**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 27a paĝo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 700 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №2 (184).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 24 января 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

**E**n la dua novjara tago mi veturis bicikle ĝis mia laborloko. Nek vojo, nek vetero promesis facilan promenadon. Kaŝante la nazon enskarpen mi grumblis pri milvoĉe anoncita tergloba plivarmiĝo, kiu tute ne ŝajnis minace aktuala. En dezerta kampo mian biciklon devancis kavalkado de nigraj aŭtoj — fenomeno ne tipa por la loko kaj feria postfesta tago. Baldaŭ mi vidis antaŭe renkontantan nigran aŭtokolonon. La du kolonoj unuiĝis, pasis dekstren, ĝis aparta monteto kun sablejo. La aŭtoj stariĝis, duoncento da nigrevestitaj viroj okupis la pladon de la sablejo. La frosta bildo akiris funebran nuancon; distance ekŝajnis al mi, ke herdo de korvoj surteriĝis inter tomboj. Haltinte por pumpi la radon, mi aŭdis viglajn ekkriojn — la publiko estis en bona humoro.

— La polico, — diris mia kolego en la laborejo, — la polico, certe, konas tiun lokon. Ankaŭ mi ĝin konas, vidis tiujn kunvenojn. Ordinara afero — la fratuloj inspekte paradas. Fakte, la polico ja estas ilia subtaĉmento.

Mi rememoras alian biciklan vojaĝon. Tiu okazis fine de la pasinta jarcento. Mi revenis de la laborejo per marranda vojo. Bonega frusomera vetero harmoniis kun pitoreskaj pejzaĝoj, la deklivo permesis ne turni la pedalojn. Mi min sentis en plena sereneco. Tamen la urbeto, kiun mi eniris akcelrapide ŝajnis kaptita de tute inversa emocio. Duoncento da junuloj (ĉu grupturistoj) kun bierboteloj enmane paŝis blokante la aŭtovojon. Ferocaj krioj kaj minacaj gestoj semis timon kaj panikon. La preterpasantoj cedis la teritorion eskapante ĝis najbaraj stratetoj. La butikistoj hastis fermi la pordojn kaj ŝirmi la vitrinojn. En mallarĝa strateto urborande mi rimarkis polican patrolon. La policanoj sin kaŝis en arbustoj.

Se oni forigos la pejzaĝdetalojn, mi pensis, oni ekhavos en la resto certan simbolon de diferenco inter du epokoj de nia novrusa historio. Ĥaosaj perturboj, hazardo kaj turmentaj perpleksoj de la tempo de Jelcin. Kaj la pacigo, fatalismo, trankvilo kaj ordo de Putin. La preterpasantoj ĉesis paniki, la viktimoj ĉesis reziston, la fratuloj estas en la leĝo, kaj la polico — trovinta sian modestan niĉon en la nova bilanco de fortoj.

— Ĉu vi volas reveni al la anarĥio de la 1990aj? — demandas emfaze parolantaj kapoj en TV.

Certe, ne. Neniu frenezulo pri tio povus revii.

— Ĉu vi pretas plu toleri la bandokration de la nova ordo? — retorike demandas el siaj legitimitaj rezervejoj oratoroj de opozicio.

Retorike, ĉar tute klaras, ke jes. Samkiel, oni toleris la malbenitan anarĥion, kiu forpasis ja ne pro decidaj pereigaj frapoj deeksteraj, sed pro sia propra neceso, kiun fizikisto nomus leĝo de kresko de la entropio kaj iu “batala frato” eksplikus (se li divenus) per la vortoj el populara kanto de la tutlande amata bardo Aleksander Rozenbaum:

*Fratuloj, ne plu interpafu! Ja devas vi vidi:*

*Nenion, nenion vi havas jam plu por dividi.*

*Alen Kris*

**Sur la kovrilpaĝo** estas bjalistikanoj kaj iliaj gastoj dum la solena ceremonio je la Zamenhofa naskiĝtago en la Zamenhofa naskiĝurbo. (*Fotis Andrzej Sochacki*)

# La redaktoro respondas

Ekde 1998 la redaktoro de *La Ondo*, Aleksander Korĵenkov, ĉiuvintre intervjuas la Esperantistojn de la Jaro, sed ĉar li ne povas intervjui sin mem, estis decidite, ke ĉi-foje la intervjuanto estu Kalle Kniivilä, la redaktoro de *Libera Folio*, en kiu la intervjuo ankaŭ aperas.

**Kia estis via reago, kiam vi eksciis pri via elektiĝo?**

Kial kaŝi, ke mi estis tre kontenta?.. Parte pro la natura sento de persono kiu ricevas moralan rekompenson pro jaroj da laboro, sed ĉefe ĉar ĉi-jara elekto emfazas la gravecon de zamenhofologiaj studoj.

**Ĉu vi jam pli frue sciis, ke vi estas inter la kandidatoj? Kaj se jes, ĉu iam pripensis rifuzi la kandidatiĝon en konkurso, kiun aranĝas via propra gazeto?**

Mi eksciis pri mia kandidateco, kiam la listo de la kandidatoj estis preta. Mi apenaŭ atentis mian nomon, ĉar mi kredis, ke iu alia estos elektita, ekzemple, lige kun la Bjalistoka kongreso, aŭ kun la agado en la reto.

**La sekretario de la konkurso estas via edzino. Ĉu ŝi longe povis konservi la sekreton, kiam voĉoj favore al vi komencis amasiĝi?**

Ŝi kapablas longe teni sekretojn, mi scias, sed ĉi-foje unu tagon antaŭ la fino de la voĉdonado, serĉante necesan dokumenton, mi trovis hazarde paperfolion kun la nombro de la voĉoj, kaj mi spertis specon de ŝoko...

Je la unua momento mi volis, ke ŝi urĝe admonu la voĉdonantojn, ke ili ne elektu min, ĉar tio eble pensigos kelkajn pri manipulado, sed Halina konsilis, ke mi konsultu pli prudentajn personojn flankajn, kaj agu laŭ ilia konsilo. Nu, tiuj kolegoj, kies honesteco kaj senpartieco estas ekster ĉia suspekto, rekomendis al mi akcepti la rezulton tia, kia ĝi estos, kaj ke mi ne provu influi la voĉdonadon pro la ebla reago de la "kelkaj", kiuj facile kaj senpretekste trovas kaŭzojn por ĉikani.

**Vi ricevas la honorigon pro via ampleksa kaj zorga esplorado de la vivo, verkoj kaj ideoj de Zamenhof. Kio plej fascinas vin en la persono de Ludoviko Zamenhof?**

Permesu, ke anstataŭ respondi, mi citu el la Zamenhofa letero al Alfred Michaux, letero kiun mi metis kiel prologon al *Homarano*:

«... mia tuta vivo, de la plej frua knabeco ĝis nun, prezentas unu konstantan kaj seninterrompan serion da diversaj bataloj: a) *interne* en mi konstante bataladis reciproke diversaj idealoj kaj diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj, sed kiujn reciproke interkonsentigi estis ofte treege malfacile, kaj tio ĉi multe min turmentadis; b) *ekstere* mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenadis al la idealoj *en modo* kaj tial neniam mankis al mi mokantoj kaj atakantoj».

**Kion laŭ vi la nuna Esperantomovado povus lerni de Zamenhof?**

Lian koncepton, ke Esperanto ne estas la celo en si mem, nek agrabla ludilo, sed nur parto de pli grandioza ideo pri la unuiĝo de la homaro.

**Kiujn tendencojn en la nuntempa Esperantujo vi opinias plej subtenindaj? Kiujn plej negativaj?**

Anstataŭ paroli tro ĝenerale pri tendencoj, mi preferas nomi kelkajn konkretajn subtenindajn projektojn, inter kiuj estas la Esperanto-urbo Herzberg, la Interlingvistikaj Studoj en Poznań, Esperanto@Interreto, *Varsovia Vento*, Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, *Vinilkosmo*... Kutime, tiujn projektojn motoras etaj grupoj de entuziasmoj kun limigitaj rimedoj, kaj ĉia subteno por ili estas grava.

Ĉu negativaj? Tro da paroheco je la loka nivelo, kaj tro da koterieco je la alta nivelo. Se la unuan mi akceptas kiel neeviteblajn, mi tute ne povas kompreni tiujn, kiuj uzadas amason da energio kaj scioj — uzeblaj por disvastigo kaj utiligo de Esperanto — por flegado de siaj propraj grupetoj kaj opoziciado al la aliaj.

**Kiaj estas viaj personaj planoj kaj la perspektivoj de via revuo, via eldonejo, por la proksimaj jaroj?**

En la fino de la 2006a jaro ni estis devigitaj draste ŝanĝi nian vivon. Ni preskaŭ forlasis la instruon kaj la organizan aktivadon lokan kaj malintensigis la libroeldonadon prioritare al la revuo, kaj ĉi tiu prioritato restas. La komprenemo, fido kaj helpo de niaj legantoj instigas



nin daŭrigi malgraŭ la komplikaj cirkonstancoj, kaj ni nature serĉas kaj trovas novajn eblojn. Ekzemple, la elektronika abonantaro de *La Ondo* jam iĝis eĉ finance grava por ni, kaj nun ni esploras la teknikajn kaj merkatajn cirkonstancojn por eldonado de elektronikaj libroj. Krome, ni devos reaktivigi nian podkaston servon...

**Kiajn avantaĝojn kaj riskojn vi vidas en la eldonado de e-libroj en Esperanto? Kiel la disvastiĝo de e-libroj laŭ via kredo influos la esperantlingvan libromerkaton?**

La avantaĝoj estas tute klaraj, same kiel ekster Esperanto: e-libroj estas pli ekologiaj kaj pli malmultekostaj. Ne nur e-libro kostas oble malpli ol la papera libro, sed ankaŭ librolegilo kostas malpli ol libroŝranko, kaj do oni povas, vojaĝante, kunhavi unu libroforman (kaj libropezan!) legilon kun centoj da libroj en ĝi. La lanĉo de amasa produktado de e-libroj en Esperanto krome solvos la eternan problemon, pro kiu libro, eldonita en Estonio aŭ Makedonio atingas la leganton en Argentino, Mongolio aŭ Benino nur plurajn monatojn post la eldono, ekzemple, en Zamenhof-festo (se ties organizantoj proprariske mendis stoketon). Oni povos aĉeti la libron nemultekoste en la tuta mondo kelkajn minutojn post ĝia apero.

Ja estas problemoj pri malsamaj formatoj, pri piratado k. s., sed la kreskeganta e-libra merkato en Usono kaj Japanio, kaj precipe en Ĉinio, kuraĝigas nin, kvankam ni komprenas, ke la e-libroj iom reduktos nian tradician eldonadon, same kiel okazas pri *La Ondo*.

**Kiel ĉiuj, ankaŭ vi devas respondi al la tradicia demando, elpensita de vi mem: kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus, se oni ekzilus vin al nelegata insulo?**

La tutan *Originalaron*, alivorte: la tri volumegojn de la *Iom reviziita verkaro de L.L. Zamenhof*.

# Jaro 2009: niaj atingoj kaj fiaskoj

Inter la “Rondaj Tabloj” de *La Ondo* la plej tradicia estas la jar-ŝanĝa. Ankaŭ ĉi-foje ni petis diverstendencajn aktivulojn respondi la demandon: “Kiujn Esperanto-eventojn en 2009 vi taksas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j).”

**Peter Baláž**  
Slovakio

**Kunordiganto de E@I, estrarano de EEU, eldonisto (www.espero.sk)**

Plej pozitivaj aferoj de 2009:

— Google-subteno por Esperanto, omaĝe al la 150-jariĝo de la naskiĝo de Zamenhof;

— pluraj EU-projektoj, subtenantaj Esperanto-agadon;

— UK en Bjalistoko;

— IJK en Liberec;

— lanĉo de vendado de MP3-kantoj en Esperanto (<http://www.vinilkosmo-mp3.com/>);

— sukcesa agado de E@I, ĉefe la organizado de SES, financado far EU kaj novaj projektoj.

Plej negativaj aferoj de 2009:

— manko de adaptiĝemo de niaj gvidaj organoj de la Esperanto-movado al novaj kondiĉoj kaj ŝanĝiĝanta mondo (ne nur estas afero de la jaro 2009, sed ĝi daŭris ankaŭ en ĝi);

— subtaksita kaj malfeliĉe realigata modernigo de Pasporta Servo;

— ofta amatoreco de la Esperanto-agado, malkapablo de starigo de klaraj celoj kaj strategioj por ilia atingo.

**José Antonio Vergara**  
Ĉilio

**Estrarano de UEA pri faka kaj scienca agado**

Estas tre agrable tuj trovi menciindajn pozitivajn laŭ mia propra subjektiva rigardo al la vivo de Esperantujo:

1. la Bjalistoka UK estis aparte bona, precipe pro la emocia reveno al la loko kie Zamenhof vivis kaj revis, kaj ankaŭ pro la malofta sperto senti ke aŭtoritatoj kaj surstrataj homoj opinias Esperanton grava kaj subteninda. Mi esperas ke ĝi efikos por retrovi niajn radikojn kiel socie engaĝita kultura kaj eduka movado, kiu tute ne bezonas la lukson de riĉaj hoteloj kiel kongresejon.

2. la neatendita, belega donaco de Google por la Zamenhof-tago. Tio estis vere ĝojiga kaj efika informocelo, kaj pravas la fakton ke oni inteligente povas trovi rimedojn videbligi nian aferon.

3. la trafa eldono ĉe FEL de *Origino de Specioj* en la Darwin-jaro, kaj la okazokapto lanĉi per ĝi la serion *Scienca Penso*.

4. la daŭra kreskado de la Esperanta Vikipedio.

5. la sankcio en la brazila Senato de leĝopropono pri laŭelekta instruado de Esperanto en mezlernejoj, kaj la agado de aktivuloj de UEA kaj Edukado.net ĉe ALTE (KER).

Tre malpozitiva estis la novaĵo pri ŝajna fraŭdo al IEL.



**Jakvo Schram**

Belgio

**prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT**

Valoras diskuton, ĉu fakto ke la socio iom malkreskas pro ŝanĝanta socia vivo, sed ke aliflanke multaj homoj lernas la lingvon pere de interreto. Estas mirinde vidi kiel homoj pere de interreta kurso povas atingi altan nivelon kaj uzadas la lingvon kun verve. Problemo estas ke UEA, SAT kaj la miloj de lokaj kluboj ne vere povas altiri la novulojn al la kluba vivo. Donas iom da ĉagreno ke ni devas envie rigardi la malkreskon de aktivuloj en lokaj kluboj. Sed tiuj, kiuj agadas pere de interreto por disvastigi Esperanton riparas parte tiun perdon. Necesas do trovi manieron por revivigli la kluban vivon. La vorto estas al la nova generacio.

Ĉe SAT, post la emeritiĝo de Kreŝimir Barkoviĉ, la aktivuloj decidis, pere de laborforto de volontuloj, mem prizorgi la necesan laboron. Fine de la jaro la Plenum-Komitato de SAT povas konstati ke ĉiuj eventualaj problemoj solviĝis.

La fondiĝo de Eldona Kooperativo montriĝas esti saĝa paŝo antaŭen. Eldoniĝis pluraj novaj libroj, el kiuj “Plano B” estis la plej grava. La studo por eldoni PIV en elektronika formo evoluas pozitive. Kies rezulto devas esti ke PIV estos pli alirebla al pli grandlarĝa publiko.

La incidentoj dum la UK en Pollando devas instrui nin, ke batalo kontraŭ rasismo kaj maltoleremo devas esti unu el la prioritatoj kontraŭ kiu ĉiuj esperantistoj devas batali.

Laŭdon meritas *Ipernity* kie multaj esperantistoj renkontiĝas virtuale kaj interŝanĝas salutojn, kantojn, poemojn kaj rakontojn. Disvastiĝas kaj populariĝas per ĝi Esperanto en plurlingva medio.

**Josef Šemer**

Israelo

**Sekretario de Esperanto-Ligo en Israelo; eksa Komitatano A de UEA**

Sendube la Universala Kongreso de UEA, okazinta en 2009 en Bjalistoko, estis la plej elstare sukcesa okazaĵo en Esperantujo. El ĉiuj 20 UK-oj, kiujn mi partoprenis, ĝi estis eble la plej bona: riĉenhava, bone organizita, vere memorinda. Mi neniam antaŭe partoprenis UK-on, kiun organizis ne nur la lokaj esperantistoj sed ankaŭ la gastiganta urbestro. Mi opinias ke dank’ al tio ni ricevis ĉi-jare tre riĉenhavan kunvenon, multe pli ol kutime. Ekzemple, okazis 38 artaj programeroj. Tio estas kulmino, ĉar en aliaj kongresoj ili nombris maksimume 15.

La plej granda malsukceso de UEA kaj de la aliaj esperantistaj asocioj en la lastaj jaroj estas la fakto, ke malgraŭ la alta nombro de la personoj, kiuj lernas nian lingvon Interrete, nur tre malmultaj fariĝas poste aktivaj esperantistoj. Ekzemple: al *Lernu!* aligis ĝis nun multaj dekmiloj da homoj. Pri tiuj el ili, kiuj finis la kurson, mi demandas: **kie ili estas nun?**



**Probal Dasgupta**  
**Barato**  
**Prezidanto de UEA**

Certe unu plej pozitiva evento en 2009 mi taksas — sendepende de moraj problemoj pri tiu elekto — la aperon de la Zamenhof-biografio *Homarano* de Korĵenkov. Ĝi ekzemplas solidan kaj gravan laboron, kaj spronos pli da same altkvalita laboro.

La plej negativa evento en mia vidgamo estis la fakto, ke Zofia Banet-Fornalowa sentis sin devigata proteste foriri de la Bjalistoka Universala Kongreso. Mi volas publike bedaŭri la fakton, ke — ĉar ŝi menciis al mi, eke de nia unuafoja renkontiĝo, sian intencon momentojn antaŭ tiu protesta foriro, kaj ĉar estis momento festa kiu ligis al mi la manojn — mi mem ne trafis malhelpi la foriron mem, aŭ intervene okupiĝi pri la kialoj (kiujn ŝi ja tute eksplicite klarigis al mi). Enmiksiĝi tiom malfrue kaj deekstere en decidojn rilate la prepartlaborojn enlande faritajn estis preter la eblaĵoj je tiu stadio; sed tio ne malpliigas la intensecon de mia bedaŭro.



**Maria Sandelin**  
**Svedio**  
**Blogposedanto**

Kiel ekzemplon pri pozitiva okazaĵo dum la pasinta jaro mi ŝatus mencii la malfermon de la Esperanto-centro en Bjalistoko, kaj precipe la profesiece faritan ekspozicion *Bjalistoko de juna Zamenhof*. Alia grava kaj laŭdinda iniciato estas la libroserio *Scienca penso*.

Kiel malsukcesojn mi konsideras ekzemplojn flanke de estra(j) persono(j) silentigi malbonajn novaĵojn, kiel (samkiel en la Roterdama UK) okazis dum la Bjalistoka UK, kie la kongresa kuriero ne rajtis raporti pri la atakoj direktitaj kontraŭ la kongreso. Mi bedaŭras konstati ke ĉi tiu cenzuremo estas tendenco.



**Vjaĉeslav Ivanov**  
**Ruslando**  
**Redaktanto de Esperanto-Novosti-Info**

Mi nomu nur la plej freŝan eventon, ĉar ĝi ŝokis min.

En decembro okazis ne nur rimark-ebla kresko de atento al Esperanto (nelaste pro malavara reklamo fare de Guglo), sed ankaŭ malĝoja por mi evento: la nova tiparo *PT Sans*, kreita de la renoma moskva firmao *ParaType* (paratype.com), iĝis senpaga pro la subteno de la Federacia agentejo pri presado kaj amaskomunikiloj. *PT Sans* speciale celas etnajn lingvojn de Ruslando — probable la unuan fojon en historio aperis tre bonkvalita tiparo uzebla por la ĉuvaŝa, la tatara kaj la aliaj. Kvazaŭ moke, ĝi subtenas la tuton de “larĝigita latina” parto (kun la polaj, ĉeĥaj kaj aliaj literoj), sed ne la Esperantajn.

Mi jam iniciatis oficialan leteron de REU al *ParaType* pri tio, sed estas malagrabla kaj malsekure dependi en tia demando de arbitra volo de la direktoro en *ParaType*.



**Renato Corsetti**  
**Italio**  
**Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio**

Plej pozitiva atingo en 2009 estis la afiŝado fare de Google de la Esperanto-flago en la komenca paĝo. Tio abrupte transformis la bildon pri Esperanto ĉe multegaj homoj de mortinta lingva utopio al vivanta strebo en la direkto de lingva egaleco. Tio ankaŭ montris la vojon al aferoj, kiujn la movado devus pli konscie organizi. Mi revas pri tempo, en kiu UEA ne plu aranĝos Belartajn Konkursojn sed almenaŭ ankaŭ Belinformajn Konkursojn.

Plej negativa fenomeno, laŭ mi, estas la preskaŭ absoluta malinteresiĝo de la movado pri la nova labor-plano de UEA. Tio montras, laŭ mi, ke la movadanoj ne plu esperas ion de UEA aŭ de si mem rilate al Esperanto. Ili ja deziras la servojn, sed ne vere pensas, ke oni devus fari ion por alparoli la mondon kaj ŝanĝi la situacion kaj eĉ ne pretas pensi pri tio.



**Giorgio Silfer**  
**Eŭropo**  
**Verkisto, instruisto kaj organiza konsilisto, nuna Konsulo de la Esperanta Civito**

**Positive:** La relative bona kulturenivelo de diversaj jubileaj eventojaroj, kun pozitiva eĥo ankaŭ ekstere, interalie la Google-honorigo la 15an de decembro.

— La progreso de la studoj kaj kritikaj analizoj pri Zamenhof kaj lia ideologio, markita per kelkaj libroj kaj la unua Simpozio pri Homaranismo en Svislando.

— La ekspansio de la LingvoTesta Sistemo de la Esperanta Civito, bazita sur la Komuna Eŭropa Framo de Referenco.

— La kreskanta aktiveco en Afriko, malgraŭ severaj malfacilaĵoj.

**Negative:** La revekiĝo de persekutemo kontraŭ la esperanta popolo, aparte rimarkebla dum UK en Bjelostoko.

— La financaj kaj reputaciaj malfacilaĵoj ĉe pluraj institucioj, jen ĉefe pro la ĝenerala konjunkturo (Esperantic Studies Foundation), jen ĉefe pro malkompetenta administrado (Kastelo Greziljono), jen ĉefe pro manko de ideoj kaj laborfortoj (La Kvinpetalo), jen ankaŭ pro ŝtelo de mono (Internacia Esperanto-Instituto).

— La ridindeco de la kampanjo Change por Obama, kie UEA engaĝis sin ĝis kompromitiĝo.

— La kreskanta tensio inter Roterdamo kaj Afriko, specife inter la ĝenerala direktoro / estraro de UEA kaj ĉefaj afrikaj aktivuloj.



**Spomenka Ŝtimec**  
**Kroatio**  
**Verkistino, sekretario de Kroata Esperanto-Ligo**

Mi ŝatus, kiel la plej pozitivan eventon de 2009 elstarigi la engaĝiĝon de la urbo Bjalistoko por la sukceso de la 94a Universala Kongreso de Esperanto. Ni havu pluajn tiajn urbojn en kiuj Esperanto hejmas.

La plej fiaska ne venas momente en mian kapon.



# Esperantujo festas la Zamenhofan jubileon

**Japanio.** La 17a Zamenhofa Vespere, okazis 5 dec en Tokio kun pli ol 60 ĉeestantoj. Tage prelegis pri Zamenhof kaj aliaj temoj Mizuno Yosiaki, Ulrich Lins, Klivo Ledon, kaj Syōzi Keiko. Sinsekvis kantado, salutoj de novuloj kaj diskutado en grupoj. Vespere oni ĝuis gajan vespermanĝon. (LA)

95 personoj, inkluzive de junuloj, partoprenis 13 dec en **Koobe** Zamenhof-Feston de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj. Post saluto de Takuma Kenzi, pri “Pacologio kaj Zamenhof” prelegis Teraĵima Toŝio, kaj pri “Informado pri libroj pri Esperanto kaj en Esperanto” prelegis Mine Yositaka. En la arta programo estis koncerto de la koruso *Heliko*, du skeĉoj, prezento de la libro *Mirakla pomo*. La libroservo vendis je 129 mil enoj (ĉ. 1 mil eŭroj). (LA)

**Kroatio.** La festado en Zagrebo enhavis tri erojn: lanĉo de la granda Kroata-Esperanta Vortaro de Lucija Borčić, eldonita kun financa helpo de Ministerio pri kulturo; atribuo de la monpremio *Kalendulo* pro la meritoj en la Zamenhof-jaro 2009; primera prezento de nova spektaklo de la drama trupo de la Studenta E-Klubo, kiu festis 50-jariĝon de sia laboro. (Spomenka Štimec)

**Rumanio.** La Zamenhofan jubileon memorigis du ekspozicioj: en la distrikta biblioteko de la urbo Pitești (la ĉefurbo de la distrikto Argeș) kaj en la distrikta muzeo de la urbo Slatina (la ĉefurbo de la distrikto Olt). Pri la ekspozicioj informis amaskomunikiloj. (Marian Vochin)

Căminul Județean Olt  
MUZEUL JUDEȚEAN OLT

Expoziția foto-documentară  
**MOMENTE DIN ISTORIA  
MIȘCĂRII ESPERANTISTE  
ÎN ROMÂNIA  
1889-2009**

Manifestarea este circumscrisă acțiunii UNESCO:  
150 de ani de la nașterea lui  
Ludwig Lejzer ZAMENHOF (1859-1917)  
inițiatorul limbii esperanto

la sediul  
**Muzeului Județean Olt**  
din Slatina, str. Ana Ipătescu 1

27 AUGUST - 15 DECEMBRIE 2009



Hungaro, aŭstro kaj francino festas en Vieno (Fotis Elisabeth Hlauschek)

**Aŭstrio.** 5 dec en la Pola Instituto de Vieno, kun ĉeesto de gastoj el Hungario kaj Francio, oni aranĝis Zamenhofan Feston. Festparolis pri Zamenhof mag. Bernhard Tuider el la Esperanto-muzeo en Vieno. Post muzika omaĝo de Piotr Kosciak, kiu pianludis du pecojn el Ŝopeno, la prezidanto de la Fondaĵo Ivo Lapenna, d-ro Klaus Perko, prelegis pri la 100-jariĝo de Lapenna. Sekvis *La Espero* kaj bufedo. (Leopold Patek)

**Finnlando.** La malfermaj pordoj en la oficejo de EAF en Helsinki alvokis dekon da vizitantoj dum la Zamenhofa Tago mem. Ili konatiĝis kun finna versio de la lernolibro de Stano Marček, ĝuis la amuzan etoson, trinkis la tradician *glögi*-trinkaĵon kun spickukoj, biskvitoj kaj bombonoj. Saliko deklamis du belajn poemojn. La gazetara komuniko pri la Zamenhof-tago realigis kelkajn reagojn en la landa gazetaro. (EAF-agadas)

**Angolo.** Aktivuloj de la Angola E-Asocio omaĝis la Zamenhofan jubileon per Ago-Tago en la Beletra Fakultato de la Universitato Agostinho Neto (la sola angola oficiala universitato). La sepdeko da universitatoj aŭskultis prelegon pri Esperanto, havis enkondukan lecionon kaj kolokvon pri Esperanto, en kiu estis metitaj pluraj demandoj. (LA)

**Benino.** 19 dec 2009 junaj Beninaj esperantistoj renkontiĝis en la Afrika Oficejo de UEA (AO) en Lokossa. La prezidanto de la landa asocio AdBE, Latifou Gbadamassi, kaj aliaj alparolis la kunvenintojn; Ezin Mechack, prezidanto de klubo *Arigbo* prelegis pri Zamenhof. Poste la partoprenantoj trapasis kelkajn vidindaĵojn de la urbo Lokossa, haltis en la urboĝardeno por babili kaj kanti, tagmanĝis en restoracio, kaj revenis al AO por la fermo. (*Esperanto en Afriko*)

**Israelo.** La Zamenhofa Festo, kiu samtempe estis jarkunveno de la landa asocio ELI, okazis 21 dec en la Tel-Aviva kulturdomo ZOA kun pli ol 50 partoprenantoj. La jarkunvenon sekvis la solena festo, kiu inkluzivis hebrelingvan prelegeton de Josi Ŝemer pri la *Unua Libro*, filmon pri la Esperanto-poeto Mikaelo Giŝpling (preparis Gian Piero Savio), prelegon de prof. Itamar Even-Zohar pri la personeco kaj unikaj kapabloj de d-ro Zamenhof, kaj multajn artajn programerojn. (LA)

**Ruslando.** 25 moskvanoj festis la jubileon de Zamenhof 13 dec en la restoracio *Ĝezve* kun eta koncerto, aŭkcio, komuna kantado kaj tostoj. Sekvatage en la EK *Lev Tolstoj*, Nikolao Gudskov rakontis pri Zamenhof lige kun la apero de *Homarano* de Aleksander Korĵenkov. (Valentin Melnikov)

15 dec en la kafejo *Mango-gril* en **Peterburgo** la E-koruso *Blua Ponto* prezentis pli ol dek kantojn en Esperanto kadre de la festa Zamenhofa koncerto antaŭ ĉ. 40 peterburganoj. (Anatolij Sidorov)

Preskaŭ 40 homoj de diversaj Uralaj urboj kunvenis en **Jekaterinburg** malgraŭ la frosto por omaĝi la 150-an datrevenon de Zamenhof. Estis prezentita filmo pri la Majstro, okazis ekspozicio. La amika rondo de Uralaj esperantistoj akceptis kursfinintojn. (Aleksandr Osincev)

Okaze de la jubileo en **Kaliningrado** aperis eseo de Aleksander Korĵenkon pri zamenhofologio.

Aleksander Korĵenkov

**ZAMENHOFOLOGIO**  
Aktualaj problemoj kaj taskoj



Gaja festo en Harbino

**Ĉinio.** 30 dec Liaoning-provinca Esperanto-Asocio aranĝis kunvenon okaze de la naskiĝtago de Zamenhof en sia sidejo, Liaoning Universitato. La programo enhavis omaĝon al Zamenhof (Li Lianzhong), rakontojn pri la partopreno en esperantistaj kongresoj, interparolojn pri la okazigo de la 6a Nord-Orienta Ĉina E-Kongreso kaj de la 6a Azia E-Kongreso en 2010. Instruistoj ricevis librodonaĵojn, senditajn de Hori Yasuo. Laste Zhang Wei, honora prezidanto de LEA kaj vicestro de la universitato aranĝis bankedon. (Wu Guojiang)

La jubileo de Zamenhof, la novan jaron kaj la studofinon de studentoj de la Heilongjiang-a Scienc-Teknika Instituto oni festis samtempe 11 dec en **Harbino**. Oni legis gratulmesaĝojn kaj studentoj ricevis premiojn pro la parola konkurso. Studentoj okazigis artan programon, post kiu ĉiuj dancis, trinkis teon, manĝis bombonojn kaj fruktojn kaj multe fotis. (Song Ping)

En la lernejo por postprofesiaj studoj de **Foshan**, kie cent lernantoj studas Esperanton, 15 dec oni festis la Zamenhofan Tagon. La salutajn kaj festajn paroladojn sekvis retbabilado de la gelernantoj kun esperantistoj el Francio kaj Brazilo. Fine, ĉiuj en amikeca etoso manĝis kaj trinkis. (Augusto Casquero)

Je la Zamenhofa jubileo UEA mendis de la poŝta kompanio TNT specialan poŝtmarkon kun la portreto de la Inicjatoro.



**Brazilo.** 11 dec en la Pollanda ambasado en Braziljo pli ol 60 kunvenintojn salutis kaj bonvenigis la ambasadoro Jacek Junosza Kisielewski. Post nelonga prelego de la prezidanto de la Brazila E-Ligo, prof. José Passini, estis legita mesaĝo de Ludoviko Zaleski Zamenhof. Georgo Handzlik prezentis sian monodramon pri Zamenhof; kaj la kantistoj Lys kaj Jean Nardoto kantis en Esperanto. La ambasadoro ricevis librojn en/pri Esperanto kaj regaligis ĉiujn. (Carlos Maria)

52 esperantistoj kunvenis 27 dec en restoracio en la centro de **Taguatinga** por festi la Zamenhofan jubileon. La festmanĝo estis antaŭita de artaj prezentadoj: la pola aktoro Georgo Handzlik prezentis teatraĵon pri Zamenhof kaj kantis. Ankaŭ Flávio Fonseca, Euzébio Carvalho kaj Carlos Maria prezentis kantojn. (Carlos Maria)

Kantas Euzébio Carvalho (*Fotis Neudo Lima*)



**Bosnio-Hercegovino.** Esperantistoj de Banja Luka 16 dec organizis Tagon de la Esperanta Kulturo dediĉe al la 150-jariĝo de Zamenhof kaj al la 30a datreveno de la E-aktivado de profesoro Ljubiša Preradoviĉ. En la moderna artkafejo "Akvana" Saša Pilipoviĉ, Mico Vrhovac, Aleksandar Duriĉ kaj Sveto Preradoviĉ prezentis teatran kaj muzikan programon. Profesoro Preradoviĉ ricevis specialan premion. Inter la ĉeestantoj estis kelkaj ĵurnalistoj, kiuj raportis pri ĝi gazete, radie kaj televide. (LA)

**Hungario.** Post la himnoj kaj salutoj en la Budapeŝta *Domo de Nacioj* oni ĝuis poembukedon de Amika Rondo de Tiszafüred kaj kantojn de Anjo Amika. D-ro Árpád Rátkai prelegis pri vera nomo de Zamenhof kaj d-ro Endre Dudich pri Ivo Lapenna. En la dua parto de la festo ĉiuj iris al la strato Nyúl 4, kie estis inaŭgurita memortabulo de la poeto kaj tradukisto Kálmán Kalocsay. Tie okazis festparolado, deklamado, kantado kaj metado de florkronoj. (*Novaĵletero de HEA*)



## En Varsoviaj vendejoj

*Pano, fromaĝo, sukero, kolbasetoj, robo kaj jako* — interalie tiujn vortojn en Esperanto renkontis klientoj de kelkaj vendejoj en la varsovia kvartalo Muranów, kie loĝis Ludoviko Zamenhof. Okaze de lia 150-a naskiĝdatreveno tiun ŝanĝon de etiketoj preparis Pola Esperanto-Junularo kune kun kuratorino Natalia Romik kaj Historia Muzeo de Polaj Judoj. La reagoj de klientoj estis malsamaj, kelkaj miris pri la novaj verdaj etiketoj, dum aliaj tuj rekonis, ke temas pri Esperanto.

Kadre de la okazaĵo, apud la domo, kie loĝis Zamenhof, oni kantis por li *Cent jarojn*, kaj la poeto Wojciech Stamm deklamis poemon en Esperanto.

Pri la evento multe informis amaskomunikiloj. Anoncoj antaŭ ĝi aperis en la du plej gravaj ĉiutagaj gazetoj en Pollando: *Gazeta Wyborcza* kaj *Rzeczpospolita*. Sonraportoj aperis en la unua programo de la Pola Radio kaj en la populara junulara radio *Eska*. Dum la tuta tago en la varsovia radio *Kolor* sonis registraĵoj de lunda renkontiĝo kaj Esperanto-leciono de la junulara Esperanto-klubo *Varsovia Vento*.

Esperantistoj gastis en Pola Radio EURO (Mariusz Majewski, prezidanto de PEA-filio en Varsovio) kaj en TOK FM (Łukasz Żebrowski).

Tamen la plej mirindan efikon donis anglalingva raportaĵo de Associated Press. Kun la titolo *Eŭropo solenas la 150-an naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto* ĝi estis aperigita en kelkdek amaskomunikiloj en la tuta mondo, interalie, en *Yahoo*, *Time* kaj *The New York Times*.

**Łukasz Żebrowski**

## Google: Reklami Esperanton ... sen esperantistoj

Iuj nomis ĝin “la plej amasa varbado en la tuta historio”. Tamen ne temis pri kampanjo de esperantista organizo, nek necesis presi multegajn afiŝojn aŭ elspezi milojn da eŭroj. Sufiĉis taŭga okazo, eta planado kaj favoro de unu iom pli granda firmao. Tial la 15an de decembro 2009 preskaŭ du milionoj da homoj tra la tuta mondo pro propra scivolemo serĉis informojn pri Zamenhof kaj Esperanto. La eksterordinara rezulto de tiu ĉi Zamenhofa tago ŝuldiĝas plejparte al ununura evento: aperigo de Esperanto-flago sur la ĉefpaĝo de la plej populara interreta serĉilo Google. Okaze de la 150-jara jubileo de Zamenhof ĝi reklamis Esperanton. Senpage.



Dennis Hwang, tridekjara usona koreo, estas eble la plej fama nekonata artisto en la mondo. Kiel ĉefa retejestro en la firmao Google, li desegnas emblemojn kiujn la serĉilo montras ĉe specialaj okazoj. Google honoras elektitajn datrevenojn per modifo de sia buntlitera emblemo, kutime anstataŭigante kelkajn el ties literoj per similaspektanta grafikajo rilata al la temo. Tia emblemo poste dum la koncerna tago montriĝas en loko de la kutima kaj facile kaptas atenton de la uzantoj.

Kelkfoje jare Dennis kunvenas kun eta grupo de Google-teamanoj por decidi kiujn eventojn honori per speciala emblemo. Ekde 1998 estis jam pli ol 700. Paŭzante la muson super la emblemo, scivolemulo povas lerni pri ĝia signifo, kaj klako sur ĝin ligas al Google-serĉo kiu ebligas ekscii pli pri la fenomeno. Multaj el la emblemoj montriĝas nur en unu konkreta lando (ekzemple la “e” ŝanĝita al € por celebri la akcepton de la eŭro en Slovakio la 1an de januaro 2009), sed kelkaj estas internaciaj kaj destinitaj por ĉiuj landaj kaj



lingvaj versioj de la retejo. Laste tiel tutmonde festiĝis la naskiĝtago de Isaac Newton (4 jan 2010), la nova jaro (1 jan 2010), kristnasko (serieto ekde 21 ĝis 25 dec 2009) kaj la “150-jara naskiĝtago de L.L. Zamenhof — Fondinto de Esperanto” (15 dec 2009).


En la Zamenhof-taga emblemo aperas anstataŭ la litero “l” en “Google” verda Esperanto-flago. Laŭ la servo Doodlewatch, ĝin aperigis entute 33 landaj retejoj de Google (AM, AR, AT, BA, BG, BY, CH, CL, CN, CO, DE, ES, FR, GR, HK, IL, IT, JP, KR, MD, MX, NL, PL, RO, RS, RU, SE, SI, SK, TM, TW, UA, US); tamen ĝi ne aperis en la ĉefa internacia retejo [www.google.com](http://www.google.com), kaj krome en kelkaj landoj kie Google disponeblas plurlingve nur iuj lingvoj montris ĝin. Ne eblas trovi la kialon, pro kiu ekzemple Brazilo, Ĉeĥio, Hungario aŭ Litovio estis ekskluditaj, sed eblas almenaŭ supozi ke la priskriba teksto simple ne tradukiĝis en la lokan lingvon.

Klakinte sur la emblemon, oni alvenis al la serĉorezultoj pri “Zamenhof” aŭ “Esperanto”. En ili pinte kutime troviĝis la nacilingvaj artikoloj pri Esperanto kaj Zamenhof el la Vikipedio. Flanke aperis ofte ankaŭ reklamo pri la retejo *lernu!* aranĝita de E@I. Kaj kiam dum la tago gazetaro komencis raporti pri la datreveno, ankaŭ ligiloj al tiaj artikoloj ekaperis apud la rezultoj.

Google mem konkretajn nombrojn ne publikigas, tial eblas nur diveni ke la kunflagan emblemon en ĝi vidis keldek milionoj da homoj. Laŭ aliaj statistikoj tamen jam eblas sufiĉe precize mezuri la efikon de tiu varbado.

### Wikipedia article traffic statistics

L. L. Zamenhof has been viewed 662003 times in 2009



Kaj la statistikoj de la Vikipedio estas senspirigaj: Dum kutime la angla lingvan (t.e. la plej legatan) vikipedian artikolon “L. L. Zamenhof” legas 330 homoj tage, okaze de la ĵusa Zamenhofa tago ĝi estis legita 850.000-foje! Simile estis ankaŭ ĉe “Esperanto”, kun 170.000 vizitoj tiutage. Entute en la 30 plej grandaj lingvaj versioj de Vikipedio ĉirkaŭ la Zamenhof-tago estis 1.750.000 vizitoj al la artikoloj pri Zamenhof kaj 650.000 al tiuj pri Esperanto. Plej altan kreskon

spertis la itala “Lingua esperanto” (100 mil vizitoj) kaj la hispanlingva “Lázaro Zamenhof” (440 mil vizitoj). Efiko de la Esperanto-varbado sentebliis eĉ ĉe flankaj temoj kiel “Białystok”, “Neutral Moresnet”, “Petr Ginz”, “Persone”, “Volapük” aŭ “George Soros”. Ne tuton de la sukceso tamen eblas atribui sole al la Google-kampanjo — certan rolon en konkretaj landoj foje ludis ankaŭ unuopaj gazetaraj elpaŝoj.

Pro tiom amasa varbado, pluraj esperantistoj 15 dec kun surprizo ricevis de siaj amikoj gratulojn okaze de la “Esperanto-tago”. Kaj pluraj personoj efektive decidis eklerni Esperanton: La retejo *lernu!* spertis malfacilan tagon, kiam ĝia servilo subite ekhavis vizitojn de 29 mil homoj el 114 landoj, anstataŭ la kutimaj kvin mil unikaj vizitantoj tage. Pro la eksterordinara ŝarĝiĝo, la paĝoj malfirmiĝis tre malrapide, tamen la retejo ne kolapsis. La sekvan tagon, kiam la situacio trankviliĝis, evidente pluraj homoj revenis kaj enprofundiĝis en la studadon, ĉar tiam estis nur 9.000 vizitantoj sed rekorda nombro de 171.000 vizititaj paĝoj. Ankaŭ unuopaj Esperanto-organizoj raportis speciale multajn aliĝintojn al kursoj: ekzemple, en Francio dekobliĝis la vizitoj al la retejo de UFE samkiel aliĝintoj al retaj kursoj, kaj sepoble pli da vizitantoj ricevis eĉ la paĝaro de SAT.

La sukcesego de la Google-kampanjo klare montras la potencon de Interreto en informado pri Esperanto. La situacio iom similas tiun kiu staras malantaŭ la sukceso de la esperanta Vikipedio: se en grava reta projekto estas persono favora al Esperanto kaj se troviĝas sufiĉe da aliaj “simplaj” esperantistoj kiuj la aferon subtenas, oni foje sukcesas atingi por Esperanto honoron neimagitan. Malgraŭ tio, pliaj fortoj plu estas necesaj: La ĵusaj eventoj klare atestis ekstreman neceson de kvalitaj nacilingvaj informoj pri Esperanto kaj Zamenhof en la Vikipedio — dum tie nun pri Esperanto kvalite elstaraj estas nur la artikoloj ĉeĥa, itala, japana kaj kataluna, kaj ankaŭ tiuj kun malaktualaj; el la artikoloj pri Zamenhof elstara estas tute neniu! Celkonscia internacia strebo gvidata de kelkaj fakuloj certe povus ŝanĝi multon ankaŭ pri tio ĉi.

Detalan analizon de la kampanjo, inkluzive de precizaj ciferoj kaj fontindikoj, eblas trovi ĉe la E@I-blogo:

<http://blogu.ikso.net>

**Marek Blahuš**

[Ĉi tiu artikolo aperas kiel neplanita ero en la rubriko E@I Informas.]



## En la naskiĝurbo de Ludoviko

Antaŭ 150 jaroj, en malgranda ligna dometo ĉe la strato Zielona en Bjalistoko juna virino kriis pro doloro naskante bebon. En siaj plej kuraĝaj revoj ŝi ne supozis, ke la bebo iĝos monda civitano, pioniro de la ideo de unuiĝo de popoloj surbaze de propravola interkompreniĝo.

150 jarojn poste gazetaro informis, ke ne ekzistas en la mondo alia persono, krom Ludoviko Zamenhof, omaĝe al kiu samtempe en diversaj landoj diversaj popoloj festus ties naskiĝdatrevenon.

Ankaŭ nun ĉio komenciĝis per “Mistero de la naskiĝo”. En la Centro Zamenhof pola kaj eksterlanda esperantista publiko spektis teatraĵon de Adam Walny, unu aktoro kaj multaj marionetoj. La spektaklo similis al tradiciaj popolaj mezepokaj teatraĵoj kaj en groteska formo rakontis pri la cirkonstancoj de la naskiĝo de Jesuo, eble Ludoviko? La pupoj estis modestaj kaj ege inventeme faritaj. La aŭtoro provis prezenti ne la tutan veron pri Dio, sed homan imagon pri la mistero.

Vespere la Universitata Biblioteko gastigis 70 poetojn de Podlaĥio, kiuj kun agrabla konsterniĝo unuafoje prenis en la manojn la Esperantan *Antologion* kun siaj verkoj. Jan Leończuk, la direktoro de la Podlaĥia Biblioteko, elektis verkojn; poste Tomasz Chmielik, Lidia Ligeża kaj István Ertl tradukis ilin. Loka poezio eldonita en la universala lingvo donis ŝancon al la poetoj esti konataj en la mondo. La toruna *Studio P* prezentis en Esperanto elektitajn verkojn.

Zbigniew Romaniuk estas podlaĥia historiisto, fama inter esperantistoj pro emociigo de legantoj kaj aŭskultantoj. La 12an de decembro li en ege interesa formo, montrante fotokopiojn de arkivaj dokumentoj, prelegante en la Centro Zamenhof, anoncis ke Marko Zamenhof naskiĝis en Suwałki, sed ne en Tykocin. Turismaj gvidantoj, kiuj partoprenis la prelegon, volis certigi sin, ĉu ili bone komprenas. Okazis nekredibla bruego. Tomasz Chmielik, kiu tradukis lian prelegon, subtene aldonis novajn informojn.

Tomasz Chmielik prezentis klezmeran muzikon kaj komentis ĝin aldonante siajn proprajn impresojn ligitajn kun artistoj, kaj samtempe piedoj de publiko ritme “dancis” belegajn judajn dancojn. Surprizis nin la talenta junulara grupo kreita en la Centro Zamenhof speciale por ludi klezmeran muzikon. La unuan fojon la infanoj prezentis sin dum la 10aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj kaj ludis kelkajn kantojn. Esperantistoj, starante



En la kafejo FAMA (Fotis Andrzej Sochacki)

en granda rondo, lernis paŝojn de ĥasida danco.

Tradicie, la reprezentantoj de la urbestro, bjalistokanoj kaj esperantistoj metis florojn kaj lumigis kandelojn apud la monumento Zamenhof, partoprenis Esperantan diservon por la paco inter la popoloj. Gvidis ĝin la rektoro de la Pastra Seminario.

La plej granda surprizo de la vespero en la kafejo FAMA estis alveno de la animo de Ludoviko. Ĝi ne estis tro babilema dum la teatraĵo, tamen la publiko ridegis kaj aplaŭdis junajn artistojn. 30-kilograman torton por la gastoj fondis la urbestro de Bjalistoko.

Dimanĉe, dum la Zamenhof-tagoj devas esti ekskurso... Komence buso, poste blankaj ĉevaloj tirante ĉarojn el Dezerta Okcidento je vetkonkuro kun vento kondukis nin tra la Praarbaro de Knyszyn ĝis agroturisma bieno en Surajkovo. La ĉevalestro pafis per vipo, la ĉevaloj saltadis, la gastoj kriadis pro timo kaj ĝuado de libereco. Arbara lignofajro, kolbasetoj, kantoj Esperantaj kaj alilingvaj...

Samtage, la 13an de decembro, okazis Ĝenerala Kunveno de la Fondaĵo Zamenhof. Estis elektita nova prezidanto, Brunetto Casini (Italio), kaj nova estro de la Konsilantaro, profesoro de juro el la Universitato en Bjalistoko, Dariusz Kijowski.

La kvaran tagon ni pasigis en la sidejo de la Bjalistoka E-Societo. Komence junularo ekzercis faradon de judaj paperornamaĵoj. La rezultoj servis poste kiel dekoraĵo de la salono, en kiu okazis solenado de la patrono de la lernejo.

Ŝatantoj de la kurtonda radio havis okazon spekti la ekspozicion de centoj da QSL-kartoj ricevitaj post la 94a UK kaj uzi kurtondan stacion por provi kontakton kun la vasta mondo.

Amika rondo ĉe ronda tablo. Tiel oni povas priskribi ludojn proponitajn al gastoj de nia franca volontulo Kristof. Kun plezuro mi observis grandan lingvan progreson de la bjalistoka junularo. La ĉefo de la junulara rondo, Przemek, ofertis al ni malnovajn mutajn filmojn kun Esperantaj surskriboj. Ekstere frostis kaj neĝis, sed en la Esperanta kinejo ni kore ridegis observante aventurojn de indianoj en la Dezerta Okcidento.

Ni partoprenis la solenadon de la patrono de la 51a bazlernejo *Ludoviko Zamenhof*. Infanoj prezentis mallongajn teatraĵojn, kaj la vicurbestro Aleksander Sosna enmanigis premiojn fonditajn de la komunumo Bjalistoko al grupoj kaj individuaj infanoj, kiuj gajnis en diversaj konkursoj pri Zamenhof.

La 15an de decembro je la 12a horo bjalistokanoj aŭdis de la urba turo *La Esperon*. *Gazeta Wyborcza* tiutage aldonis al 15 mil ekzempleroj de sia ĉiutaga eldono la suplementon *En 80 tagoj ĉirkaŭ la mondo kaj ĉie Zamenhof kaj Esperanto*. Kvar tutpaĝaj ilustritaj artikoloj diversforme rakontis pri Zamenhof kaj lia heredaĵo.

Elżbieta Karczewska intervjuis Roman-on Dobrzyński pri liaj renkontiĝoj kun spuroj de Zamenhof kaj Esperanto en la tuta mondo. Tomasz Wiśniewski proksimigis al legantoj Esperantan vivon en Bjalistoko en la intermilita tempo. Przemysław Wierzbowski rakontis pri Esperanto en la hodiaŭa Bjalistoko. Tomasz Chmielik publikigis artikolon pri la Esperanta literaturo. Sendube la suplemento estis tiutage la plej amasa eldonaĵo en Esperantujo. Zamenhof estus kontenta!

Dek feliĉuloj ricevis premiojn en la konkurso de *Gazeta Wyborcza* “La 15an de decembro 1859 en Bjalistoko...”

**Elżbieta Karczewska**



## En la Esperanto-urbo estas la unua Zamenhof-monumento en Germanio

La plej grava festo de la jaro en Herzberg okazis la 15an de decembro. Precize je la 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, en la Esperanto-urbo Herzberg estis inaŭgurita monumento omaĝe al li.

La loko de la monumento ne estas hazarde elektita. La bela marmora monumento estis starigita sur la parkloko apud la federacia strato B-247 ĉe la akvorado Herzberg (ĉe la piedira zono).

Alvenis ĉirkaŭ 70 personoj — herzberganoj kaj gastoj — por ĉeesti la inaŭguron. Preskaŭ la tuta ceremonio okazis en la kavalira salono de la kastelo de Herzberg. Ĝi komenciĝis je la 12a horo per gazetara konferenco. Je la 13a horo en la parkloko Gerhard Walter, la urbestro de Herzberg, salutis ĉiujn alvenintojn, kaj Petro Zilvar rakontis pri la historio de la monumento. Poste, akompanate de trumpeto, ili komune senvualigis la monumenton. Tiam mi unufoje ekvidis ĝin, kaj mi ne hontas konfesi, ke min ekregis fortaj sentoj. Mi sentis premon en la gorĝo, mia koro forte batadis, kaj miaj okuloj eklarmetis... Tiu momento estis ege kortuŝa ne nur por mi, sed ankaŭ por ĉiuj partoprenantoj.

Poste ĉiuj perpiede aŭ peraŭte iris al la kastelo, kie estis daŭrigata la festa ceremonio. Ni aŭskultis la koruson de la urba gimnazio kaj salutvortojn de politikistoj kaj reprezentantoj de la Esperanto-movado. Por mi, polino, kortuŝe estis aŭskulti pianludon de Ulrich Kohlrusch ludanta muzikon de Chopin. Fine de la renkontiĝo okazis inaŭguro de speciala ekspozicio pri Zamenhof, kiun oni povas ankoraŭ admiri en la muzeo de la kastelo.

La festo finiĝis per agrabla kaj bona akcepto — komuna festbufedado en la kavalira salono.

La feston antaŭis kvartaga studsesio dediĉita al la iniciatinto de Esperanto. Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar sciigis multon pri la vivo kaj agado de Zamenhof kaj lia familio, kaj ebligis admiraĵon de belaj kolektaĵoj rilataj al Zamenhof. Ĉiuj sesianoj povis konatiĝi kun fragmentoj de la verkoj de Zamenhof kaj interparoli, demandi kaj diskuti kun Heleno Fantom, kiu gvidis ĉi tiun parton de la programo. Malgraŭ la frosto okazis ekskurso tra la urbo kun Małgosia Komarnicka. La ekskurso finiĝis en la ginsenga vendejo de Jeong-ok, kie okazis gustumado de ginsenga teo.

Sabate, la 12an de decembro, en la itala restoracio *Mamma Mia* okazis festa vespermanĝo kun lokaj esperantistoj, kunlaborantoj de ICH kaj gastoj el Anglio, Hungario, Kolumbio, Koreio kaj Pollando. La mastro de la vespero estis Peter Zilvar, kiu salutis la partoprenantojn kaj poste de tempo al tempo memorigis gravajn historiajn Esperanto-eventojn. Dum la festeno ne mankis muziko, ĉar Hartmunt Mittag el Berlino ofte ludis buŝharmonikon, kaj ni komune kantis sub la gvido de Otto Kern. En amika etoso ni babilis, manĝis kaj, same kiel Sankta Nikolao, disdonis donacetojn al ĉiuj partoprenantoj.

La herzbergaj esperantistoj digne omaĝis la 150-an naskiĝdatrevenon de Zamenhof per bela festo kaj plaĉa monumento, la sola en Germanio. Ili aldonis belan novan Esperanto-vidindaĵon al la Esperanto-urbo.

**Małgosia Komarnicka**

*Eventoj*

## Semajn-longa festado en Berlino

La celebrado de la Zamenhof jubileo en Berlino daŭris dum tuta semajno lige kun la germana-pola Zamenhoffesto, kunorganizita de GEA, ties landaj sekcioj, GEJ, PEA, PEJ, Pollanda Ambasadado kaj urbaj instancoj de Berlino kunlabore kun niaj polaj najbaroj.

Ĉio komenciĝis 13 dec (dimanĉe), kiam esperantistoj komune manĝis en la restoracio *Brunch*. Sekvatage en la kafejo de la kulturdomo “Danziger 50” estis literaturvespero kun prezento de gravaj Esperanto-libroj: *La infana raso* de William Auld, *Kiel akvo de l’ rivero* de Raymond Schwartz, *Metropoliteno* de Vladimir Varankin, *Esperanto — lingvo kaj kulturo en Berlin* kaj *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins.

15 dec, je la naskiĝtago de Zamenhof, en la Esperanto-domo (Einbecker 36) estis prezentita la libro de Aleksander Korjenkov *Homarano*. La aŭtoro ne povis ĉeesti, kaj Felix Zesch rakontis pri kelkaj famaj kaj nekonataj momentoj el la vivo de la Majstro.

17 dec oni diskutis la temon “Esperanto kaj politiko — ĉu ĝemeliĝo estas vojo?” La urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg Gerhard Walter kaj esperantistoj Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar rakontis la sperton pri ĝemelaj rilatoj inter Góra (Pollando) kaj Herzberg (Germanio).

La ĉefa evento de la semajno okazis 18 dec, vendrede, en la Lichtenberga Max-Taut-Aŭlo, bele renovigita arkitektura perlo de la 1920aj jaroj, kun pli ol cent partoprenantoj — ĉefe el Germanio kaj Pollando, sed ankaŭ el Anglio, Italio, Ruslando kaj Ukrainio. La kunvenintojn alparolis la prezidantoj de GEA kaj PEA, la Bjalistoka vicurbestro kaj la urbestro de Lichtenberg (kvartalo de Berlino, kie troviĝas la Esperanto-domo, la sidejo de GEA kaj la nova Zamenhofparko). Ĉeestis membro de la federacia parlamento d-rino Löttsch kun sia edzo, konata lingvisto prof. Roland Löttsch, eksprezidanto de la Berlina Esperanto-Ligo. Festparolis prof. Martin Haase el la universitato de Bamberg. Roland Schnell prelegis pri Karl Vanselow, kaj krome okazis abunda kulturprogramo.

La sekvinta semajnfino estis dediĉita al turisma programo en kiu oni, dum frosta vetero, konatiĝis kun la ĉefurbo de Germanio kaj vizitis Kristnaskan foiron. La sabatan vesperon en la klubejo “Danziger 50” okazis koncerto de Amir.

**Irina Gerasimova**

## Feste kaj labore en Kaŭno

12–13 dec en Kaŭno okazis sinsekve la 45a kongreso de la Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj la tradiciaj Zamenhof-Tagoj.



La prezidanto de LEA, Povilas Jegorovas, raportante pri la asocia agado dum 2009, atentigis, ke, malgraŭ la ĝenerala krizo en la lando kaj internaj problemoj, la agad-nivelo restis stabila. Estis eldonitaj kvar libroj kaj du muzikaj diskaj en Esperanto, regule aperis *Litova Stelo* (sed la dissendado lamis pro la maldungo de la sekretario en Kaŭno), Antanas Grincevičius prizorgis retgazon (blogon) pri aktualaj eventoj en Litovio. Litovijaj esperantistoj partoprenis la 94an UK en Bjalistoko (59 personoj) kaj multajn aliajn kongresojn, ankaŭ ĉiujn tradiciajn renkontiĝojn en Litovio. En kelkaj urboj oni instruas Esperanton. La ĉefa defio en 2010 estas la 46a BET en Visaginas. Pluraj personoj partoprenis en la diskutado de la raporto.

La kongreson sekvis la Zamenhof-Tagoj, kiuj okazis jam la 50an fojon post la unua, kiu en 1959 estis dediĉita al la centjariĝo de Zamenhof. En sia festprelego *Etna Litovio — naskiĝlando de Esperanto* Vytautas Šilas deklaris, ke kvin urboj de la etna Litovio estas proksime ligitaj kun vivo kaj agado de Zamenhof: Bjalistoko, Veisiejai, Vilno, Gardinas (Grodno) kaj Kaŭno.

La prezidanto de LEA prezentis *Homaranon* — novan libron pri Zamenhof, verkitan de Aleksander Korĵenkov (kiu pro malsano ne povis ĉeesti) kaj kuneldonitan de *Sezonoj* (Kaliningrado) kaj LEA.

En la koncerta programo prezentiĝis Lidija Gomolickaitė-Grudzinskaitė, Georgij Stalbovskij, kaj Esperanto-ensamble el Garliava sub la gvido de Aldona Grikitiėnė.

La sekvan tagon (dimanĉe) oni diskutis aktualaĵojn de la esperantista agado en Litovio. Funkciis riĉa libroservo, oni povis aboni *Litovan Stelon* kaj aliajn gazetojn, aliĝi al la 95a UK en Havano, al BET-46 (Visaginas), al la Kongreso de IKUE (Parizo) k. a., (re)kotizi al la landa asocio kaj al UEA. La programon partoprenis 138 esperantistoj el Litovio, Pollando kaj Latvio.

**Povilas Jegorovas**

## Katalunio: amaskomunikila atento

La jubileo de Zamenhof estis elstare atentigita de la kataluna televido. La ĉefa kanalo TV3 dediĉis sian atenton al Esperanto en tri novaĵbultenoj. 13 dec la tagmezaj novaĵoj en sia interreta rubriko prezentis la vivantecon de Esperanto en la reto. Oni substrekiis la esperantlingvan Vikipedion kaj atentigis pri la retejo de KEA, aparte pri la lerniloj en ĝi kaj ĝia televida informilo KIS TV. Du tagojn poste kaj la tagmezaj kaj la vesperaj novaĵoj informis pri la muzeo de esperanto en Sant Pau d'Ordal.

Samtage *Ràdio 4* intervjuis Ramon Perera, dum *Com Ràdio* intervjuis Ferriol Macip, kaj la vespera programo *El crepuscle encén estels* de *IB3 Ràdio* pritraktis la okazaĵon. La ret-ĵurnalo *Vilaweb* aperigis artikolon *Feliĉan esperanto-tagon* kun multaj ligoj al esperantaĵoj.

Lige kun la jubileo, la barcelona eldonejo *Alpha Decay* publikigis novelon de Ferenc Szilágyi en esperanto kaj en hispana traduko sub la titolo *La liberación del juez*. La novaĵo pri tio estis dissendita de la agentejo *Europa Press*, kaj kelkaj gazetoj eĥis. *La Vanguardia* 15a dec publikigis intervjuon kun la tradukinto, Javier Guerrero. Bedaŭrinde en ĝi aperas multaj ŝablonaj kaj malĝustaj asertoj, kvankam certe la ĝenerala impresado estas pozitiva. La katalunia kultura suplemento *Tendències* de la madrida ĵurnalo *El Mundo* aperigis kolumnon pri la libro du tagojn poste.

Klara konsekvenco de ĉio ĉi estis la artikolo aperinta en *La Vanguardia* (21 dec) titolita *Feliĉan Kristnaskon* (tiele en la originalo). En ĝi la ĵurnalista Magí Camps favore prezentas esperanton kiel

facilan lingvon tre ligitan en la pasinto kaj hodiaŭ al Katalunio.

**Ferriol Macip**

## Festa simpozio en Novjorko

Posttagmeze la 15an de decembro, la Novjorka oficejo de UEA por Rilatoj kun UN gastigis simpozion okaze de la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Ĝi okazis anglalingve en la konstruaĵo 777 U.N. Placo, rekte trans la strato de la ĉefsidejo de UN. La Pollanda ambasadoro ĉe UN, Andrzej Towpik, ne povis ĉeesti, sed li sendis salutan leteron, kiun legis Thomas Eccardt.

La prelegantojn enkondukis Thomas Eccardt. Komencis Esther Schor, poetino kaj profesorino ĉe Universitato Princeton, kiu parolis pri Zamenhof kaj diversaj judaj influoj de tiu tempo. Arika Okrent, verkistino de la libro *En la lando de inventitaj lingvoj: Esperantaj rokmuziksteloj, klingonaj poetoj, loglanaj amantoj, kaj la frenezaj revuloj kiuj penis konstrui perfektan lingvon*, prelegis pri Zamenhof kaj humileco. La psikiatro James Lieberman prelegis pri psikologiaj aspektoj de Zamenhof kaj lia estrecofilozofio. Timothy Reagan, profesoro ĉe Centra Konektikuta Ŝtata Universitato, parolis pri la lingvokonstruado. Humphrey Tonkin, emeritiĝinta profesoro el la Universitato de Hartford kaj eksprezidanto de UEA, parolis pri la heredaĵo de Zamenhof.

Proksimume sepdek homoj ĉeestis, inkluzive de la ambasadoro de Benino Jean Francis Zinsou, kelkaj ĵurnalistoj, regionaj esperantistoj, kaj aliaj interesatoj. La prelegojn sekvis akcepto kun vino kaj fromaĝo.

**Scott Page**



En la Novjorka oficejo de UEA (Fotis Maki Sano)



## Bokova kalkulas pri nia subteno

La nova ĝenerala direktoro de Unesko, la bulgara diplomato Irina Bokova, sendis dankleteron al UEA pro la gratuloj, kiujn flanke de UEA prezidanto Probal Dasgupta direktis al ŝi okaze de ŝia elekto al la grava ofico. “La konfido montrita de vi al mi estos valora fonto de kuraĝigo en mia klopodado antaŭenigi, per konkretaj agoj, la idealojn kaj celojn entenatajn en la Konstitucio de Unesko”, — ŝi skribis.

Al sia letero Irina Bokova aldonis la tekston de sia parolado en la ceremonio, en kiu ŝi estis enoficigita. En la parolado ŝi prezentis sian vizion pri la rolo de Unesko kaj pri ĝia agado por respondi al la defioj kiujn ĝi alfrontas:

Ĉe la akcepto de miaj devoj mi estas plej dankema sciante, ke mi povas kalkuli pri via subteno kaj pri daŭra partnereco kun Universala Esperanto-Asocio. Miaflanke mi povas certigi vin, ke mi faros mian plejebon por plu akceli la eksterordinaran kunlaboron, kiun Unesko ĝuas kun via Organizaĵo.



La letero de Bokova estis datita la 9an de decembro. Tiu dato situas inter la datrevenoj de du mejloŝtonaj eventoj okazintaj antaŭ 55 jaroj: la 8an de decembro 1954 Unesko starigis konsultajn rilatojn kun UEA kaj la 10an de decembro 1954 ĝia 4a Ĝenerala Konferenco en Montevideo adoptis la faman rezolucion pri Esperanto.

GK UEA

## UK 2012: unuafoje en Vjetnamio

La elekto de Hanojo kiel la urbo de la 97a Universala Kongreso de Esperanto en 2012 estis la plej rimarkinda decido de la Estraro de UEA, kiu kunsidis en sia plena konsisto en la Centra Oficejo 10–12 jan. Ĝis la lasta momento ankaŭ la korea urbo Busan konkursis por la rajto okazigi la Kongreson, sed post longa diskuto la Estraro decidis favore al la vjetnama ĉefurbo.

Kutime la Estraro havas plenkunsidon en Roterdamo en marto-aprilo, sed ĉi-foje la kunsido estis plifruigita kaj okazis tuj post la ceremonio por la publikigo de festlibro por Humphrey Tonkin. La estraranoj devos ankoraŭ trakti kaj decidi pri multaj aferoj rete, ĉar pro la frua kunsidodato ekz. la financaj dokumentoj ne povis jam esti pretaj. Tio lasis al la estraranoj pli da tempo por interŝanĝi ideojn interalie pri stimulado de la nun okazanta diskuto pri nova strategia plano por UEA. Tiurilate ili atendas multe pli da aktiveco de la komitatanoj, sed ili klopodos pli vaste altiri ankaŭ membrojn kaj aliajn esperantistojn en la diskuton.

Kun Stefan MacGill, prezidanto de ILEI kaj ĝia observanto ĉe la Estraro de UEA, oni parolis pri la plua evoluigo de la instrua agado. La Estraro gratulis ILEI pro la sentebla plivigliĝo de ĝia agado post la pasintjara konferenco. Kun granda kontento oni notis la bonan starton de la Esperanto-ekzamenoj laŭ la normoj de la Eŭropa Referencadro. Pri tio raportis Katalin Kováts, membro de la UEA-komisiono pri la novtipaj ekzamenoj. Por aprobo de la Komitato oni sendos proponon pri ĝisdatigaj modifoj en la interkonsento inter UEA kaj ILEI pri la instrua agado. La interkonsento estis aprobita en la UK en Havano en 1990 kaj estos do reviziita en la dua Havana UK. La propono estis jam aprobita de la estraro de ILEI, kies komitato siavice traktos ĝin en la ILEI-konferenco en Matanzas.

Por la nova serio de elstaraj sciencaj verkoj *Scienca Penso*, en kiu jam aperis *La origino de specioj* de Darvino, la Estraro aprobis regularon kaj envicigis por aperigo la verkon *Lingvo kaj menso* de la fama lingvisto Noam Chomsky. Kiel observanto de TEJO, la nuna TEJO-volontulo Alexandre Baudry raportis pri la baldaŭa apero de la eldono 2010 de la *Pasporta Servo* kaj pri la grafika reformo de la revuo *Kontakto*.

GK UEA

## La arto labori kune


9 jan okazis en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo varmetosa aranĝo, dum kiu oni transdonis al prof. Humphrey Tonkin la festlibron *La arto labori kune* eldonitan de UEA okaze de lia 70a datreveno. La transdonon ĉeestis 50 invititaj gastoj, i.a. la estraranoj de UEA, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, prof. John Wells, kaj multaj kontribuantoj al la festlibro.

Komence de la ceremonio prezidanto Probal Dasgupta prezentis laŭdacion al la jubileulo, verkitan en poezia formo. Sekvis laŭtleĝo de gratulmesaĝo de d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof al sia “pli juna amiko”. La redaktoroj de la festlibro, d-ro Ulrich Lins kaj d-ro Detlev Blanke, prilumis la enhavon de la libro. Poste la korojn de la publiko tuŝis bela interpreto de la poemo *La vojo* de Zamenhof, deklamita de Wera Blanke. La programo kulminis, kiam Dasgupta enmanigis al sia elstara antaŭulo la imponan libron.

Post longa aplaŭdo la emociita jubileulo respondis per dankvortoj al la realigintoj de la librego kaj per omaĝo al multaj aliaj esperantistoj, kiujn li renkontis kaj kun kiuj li kunlaboris dum sia pli ol 50-jara esperantisteco. Al Tonkin precipe plaĉis la titolo de la festlibro, *La arto labori kune*, kiel esprimo de la ideo, kiu ĉiam estis al li tre grava en lia agado. Post komuna tosto la ĉeestantoj ricevis la honoron esti la unuaj por akiri la novan libron kaj ricevi por ĝi aŭtografon de Tonkin.

*La arto labori kune* estas unu el la plej ampleksaj libroj eldonitaj de UEA. Kun 109 artikoloj, eseoj, studoj kaj rememoroj, bibliografio, kaj kelkdeko da fotoj sur 900 paĝoj, ĝi estas biblioteko en si mem. Ĝi kosta 60 eŭrojn kaj estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA kaj baldaŭ ĉe aliaj libroservoj.

GK UEA



## Dibenitan Kristnaskon!



Ankaŭ ĉi-foje je la romkatolika Kristnasko, post sia tradicia Kristnaska mesaĝo en la placo Sankta Petro, Papo Benedikto la 16a diris siajn bondezirojn en pluraj (en 65!) lingvoj. Post la gvarania lingvo sekvis *Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!* en Esperanto.

Samkiel dum la antaŭaj benoj *Urbi et Orbi*, Kristnaske kaj Paske, grupo da esperantistoj ĉeestis en la placo Sankta Petro kun alte levitaj paneloj, kiuj konsistigis la vorton “Esperanto”. Plurfoje ĉi tiu vorto estis montrita de la rekta televida mond-elsendo. Pluraj ĉeestantoj kaj ĵurnalistoj metis al la literentantoj demandojn pri Esperanto.

Laŭ [www.ikue.org](http://www.ikue.org)

## Ĵurnalismo kaj Esperanto

18 nov 2009 Litovia Ĵurnalista Asocio (LŽS) en la Vilna urbodomo prezentis la almanakon *Ĵurnalistika 2008*. La prezentadon ĉeestis kaj parolis iama ĵurnalisto, vicprezidanto de la Litovia parlamento Česlovas Juršenas.

En la 215-paĝa almanako estas tri tekstoj pri Esperanto. En la jaran kronikon de la litovaj ĵurnalistoj eniris kronikaĵo de Audrys Antanaitis pri la unua Tutmonda Ĵurnalista Esperantista Kongreso en Vilno, majo 2008 (p. 198–199).

Sur la paĝoj 109–110 estas artikol-eto de Vytautas Šilas pri la revuoj *Kovno-Esperanto* kaj *Litova Stelo* kaj pri iliaj redaktoroj, ankaŭ pri ĵurnalista laboro dum la Sovet-Unia periodo kaj pri la fondo de la Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio (LEĴA).

Enestas alia artikolo de la sama aŭtoro: *Kolegos skatinami tapti esperantininkais* (La kolegoj estas instigataj iĝi esperantistoj, p. 175–177). Temas pri seminarioj de LEĴA, subteno de altranguloj al la ĵurnalista E-kongreso en Vilno (2008), (re)fondo de TEĴA kaj artikola konkurso de *Litova Stelo*.

Vytautas Šilas

## Startas la projekto *AmaHoro*

Per notaria akto en Buĝumburo, subskribita de c-ano Frederiko Nimubona kiel reprezentanto de SIPU kaj sen. Marie-France Conde Rey kiel reprezentanto de *Pro Esperanto*, startis la projekto *AmaHoro*, nome la konstruo de vilaĝo kun transnacia, filantropa kaj pacifisma alvokiĝo, sub la aŭspicio de la Esperanta Civito, sur tereno donacita de la burundia ŝtato en la suda provinco Makambo.

La notaria akto preskribas la celojn, strukturon, kapitalon kaj resursojn de la tuta projekto, kies nomo en la runda signifiĝas Pacon. La projekton gvidos konsilio el kvin administrantoj, el kiuj almenaŭ tri burundianoj: ili ĉiuj devas havi la esperantan civitanecon. El la kvin, tri estas elektitaj de la Konsulo, laŭ listo de ses kandidatoj proponitaj de la prezidanto de SIPU, dum ĉi-lastaj elektas du laŭ listo de kvar kandidatoj proponitaj de la Konsulo.

La Konsilio elektos mem sian prezidanton kaj disdonos oficojn, ankaŭ al eksteruloj. Forpasinton aŭ eksiginton oni anstataŭigas laŭ la supre priskribita proceduro: de la prezidanto de SIPU kaj de la Konsulo dependos ankaŭ la eventualaj eksigoj.

La kaskontrolantojn elektas SIPU kaj *Pro Esperanto*. Donacoj, legacoj, pruntoj de ekster Burundio pasos ekskluzive tra la Civita banko.

La Konsilio de Projekto *AmaHoro* agos aŭtonome, kvankam ne sendepende, pri la aĉeto kaj konstruo de domoj kaj infrastrukturoj, ilia luigo aŭ vendo, kaj ĝenerale pri la administrado de la projekto. La Konsulo atendas nun la kandidatliston de SIPU por proponi ankaŭ la sian. La Konsilio devus esti aktiva jam ĉi-monate.

HeKo

**Barcelona** (de maldestre): historiisto Francesc Poblet, vicministro pri lingva politiko de Katalunio Bernat Joan, prezidanto de KEA Llibert Puig.



Eventoj

## Estonta ambasadoro — denaskulo



Ulrich Brandenburg

Pluraj germanaj gazetoj, inter ili *Spiegel*, raportis, ke la nova germana registaro planas sendi la nunan reprezentanton de Germanio ĉe NATO, s-ron Ulrich Brandenburg, al Moskvo kiel novan ambasadoron de Germanio.

Ulrich Brandenburg estas ne nur membro de Germana Esperanto-Asocio, eksprezidanto de Germana Esperanto-Junularo kaj membro de la loka Esperanto-grupo en Münster, sed ankaŭ denaska esperantisto.

Rudolf Josef Fischer

## Digna prezento en Katalunio

12 nov en la Muzeo pri Historio de Katalunio okazis prezento de la libro *El Congrès Universal d'Esperanto de 1909 a Barcelona*, verkita de Francesc Poblet i Feijoo. Ĝi estas dulingva, kaj la Esperanta versio (*La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono*) ŝuldiĝas al Raul Salinas Monteagudo.

Unue Llibert Puig, KEA-prezidanto, kun respondeca sento skizis la historion de la instruado de universalaj lingvoj en Katalunio. “Oni povus pensi, — asertis Puig, — ke la angla havas la saman forton kiel la franca antaŭ ekzemple dudek jaroj. Ĉi tiu konsidero nepre kuŝas sur la fakto ke oni malatentas komunikilojn. La aktuala disvastigo de la angla ja povas plej rapide rezultigi la pereon de la ceteraj lingvoj”.

Poste Francesc Poblet realece priskribis la historian medion, en kiu okazis la 5a Universala Kongreso. Ĝuste antaŭe eksplodis popola ribelo en Barcelono kontraŭ la reganta klaso pro perforta armea rekrutado, do la Kongreso estis markita de tiu preskaŭa koincido.

Fine, parolis la Estro de Lingva Politiko de la Kataluna Registaro kaj aŭtoro de la enkonduko, Bernat Joan. Li emfazis la gravegan rolon de esperantistoj kiel subtenantoj de universalaj kaj pozitivaj valoroj kaj kiel firma bazo sur kiu sociaj ŝanĝoj estas nepre sukcesontaj.

Ramon Riera



Infanoj ne enuis en Saarbrücken (Fotis Katalin Kováts)

## Komune festi la novan jaron

Entute 194 homoj partoprenis en la 8a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj la 1a Novjara Internacia Semajno (NIS) de EsperantoLand en Saarbrücken. Ili venis el 14 landoj, interalie el Kanado, Aŭstralio kaj siberia Ruslando, sed plejparte el la pli proksimaj Belgio, Francio, Svislando kaj Germanio. Tri kvaronoj venis el eksterlando, pro kio regis bele internacia etoso.

56 infanoj kaj junuloj ĝis 14 jaroj multe ĝuis la kunestadon kaj la programon kun manlaboro, ludoj, prezentado kaj lernado de pupteatro — ĉio sub lerta gvido de Christoph Frank subtenata de Betti Maul-Propadović kaj Nicky Janssen. Almenaŭ tridek infanoj lernas Esperanton denaske kaj jen dum NR havas belan eblecon interkonatiĝi kaj amikiĝi kun samaĝuloj el aliaj landoj.

Prezentiĝis koncerto de Martin Wiese kun malnovaj kaj novaj kantoj ĉefe rokstilaj, bela koncerto de Lena kun Ĵenja, Gretel kaj Jorinde (lastatempe formiĝinta grupo), kaj aŭdeblis imponaj operaj kantoj de Vladimir Merkulov en Esperanto (akompanata de Lena Wilke). Krome vespere oni vidis teatraĵon, ludis — kaj kompreneble festis la novan jaron dancante ĝis la frua mateno. Okazis diversaj prelegoj kaj kursoj traktantaj ekzemple la ĉinan historion, budaisman meditadon, la ŝanĝojn post 1989, la planedan sistemon, ludan pedagogion kaj ankaŭ venkon (aŭ malvenkon) kaj strategion por Esperanto. Junuloj kaj junaj plenkreskuloj povis ĝui ekzemple la diskotekon, du enketludojn, ekskurson al Strasburgo aŭ prezenton de filmoj de Mr. Bean.

Kiel kutime dum NR estis kursoj por komencantoj, komencintoj kaj progresintoj, ĉi-foje denove de Katalin Kováts, Gunter Neue kaj Sylvain Lelarge. Katalin ankaŭ preparis interesitojn por la internaciaj ekzamenoj kaj ekzamenis kun helpo de Cyrille Hurstel dekon da homoj. Por kontroli la ekzamenojn, vizitis la ejon la direktorino kaj la vicdirektoro de la hungara instituto, kiu afable akceptis la Esperanto-ekzamenojn en sia programo.

Aparte afable raportis la gazetaro pri nia internacia kunveno. Germana novaĝentejo komencis per regione sendita raporto, sekvis pluraj represoj, granda artikolo en la sarlanda *Saarbrücker Zeitung*, tri minutoj en la novaĝoj de la regiona televido (programero ripetita en tutsemajna novaĝelsendo) kaj kontribuoj en tri radioprogramoj, el kiuj unu dediĉis plenan horon kun tri Esperanto-muzikpecoj al nia lingvo.

**Lu Wunsch-Rolshoven**  
EsperantoLand



Eventoj

## Fabela festivalo en Bavario

La 26an Internacian Festivalon oni povas nomi fabela. Ĝi okazis dum la jarŝanĝa semajno en la belega bavara urbo Nördlingen komplete ĉirkaŭita per mezepoka murego. La ĉeftemo *Fabeloj, fabloj kaj legendoj* revenigis nin en junaĝon. Ni aŭskultis diverslandajn historiojn kaj fabelojn...

En la interkona vespero ĉeestis dudek novuloj, kiuj rapide integriĝis al la grupo de jam konataj kaj regulaj partoprenantoj. Entute partoprenis 130 personoj el 20 landoj, la plej foraj venis el Japanio, Usono, Israelo, Ruslando...

Jam la trian fojon okazis Internacia Vintra Universitato kaj la duan fojon Internaciaj ekzamenoj laŭ la nova metodo. Estis prezentitaj baletoj, Mantro, pianludado, matena gimnastikado. Oni ofertis kurson de desegnado, paroligan kurson k.a. Siajn verkojn prezentis Lena Karpunina kaj Mikaelo Bronŝtejn. Pri la situacio en Afganio parolis Ulrich Brandenburg [pri li legu en la 13a paĝo. — LO], pri Norda Koreio kaj porka gripo Harald Schicke, pri kajakado Ugo kaj Annarosa el Italio, artan enpakadon per tukoj prezentis Masumi kaj Tacuo Huĝimoto el Japanio, memorindan jubilean IF-on en retrospektivo prezentis Brian Moon. Okazis vico da interesaj prelegoj.

En la loka bierfabriko *Ankerbräu* ĉiu vizitanto ricevis memore bierglasojn, kaj kompreneble ili gustumis diversajn bierojn. Ankaŭ urbaj promenoj kolektis multajn interesulojn. Pluraj profitis oferton de surloka saŭnado. La ekskurso al Nürnberg bone disvolviĝis.

La tradiciaj silvestraj bufedo kaj balo ĉiam donas okazon bone manĝi, babilu, amuziĝi, danci kaj bonvenigi la diverslandajn novjarojn de la partoprenantoj. La novjara promeno celis rondiron sur la ĉirkaŭurba murego. Krom la dagestana, rusa kaj israela vesperoj — dum kiuj ni estis regalitaj ne nur per kantoj, dancoj sed ankaŭ per tiulandaj bongustaĵoj — ni ankaŭ festis la Zamenhofan datrevenon per interesa programo kaj ŝaŭmvino ofertita de nia organizanto HDP (Hans-Dieter Platz) al kiu ni tutkore dankas pro la brila organizado de IF-oj, kiuj iĝas jaron post jaro pli kaj pli perfektaj.

La Festivalo estis ege sukcesa kaj mi invitas vin (re)veni jarfine al la fabela urbo Nördlingen por festi la 27an IF en agrabla kaj amika etoso.

**Liba Gabalda**

↔ Sur la apuda foto estas Inga Krejson, kiu prezentis dancon en la rusa koncerto (*Fotis Rémy Bouchet*)

## La urbo Visaginas subtenos BETon

La prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio, Povilas Jegorovas, vizitis la orientlitovian urbon Visaginas lige kun la okazigo de la 46aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-46), kiuj okazos tie 26 jun – 4 jul 2010.

La urbestro de Visaginas, Vytautas Račkauskas, akceptis esti la Alta Protektanto de BET-46, kaj promesis financan helpon al BET. Estis decidite, interalie, ke la urbo proprakoste eldonos informlibreton pri Visaginas en Esperanto por senpage disdoni ĝin al la BETanoj, aranĝos ekskursojn, kaj organizos koncertojn de urbaj artaj kolektiivoj por la partoprenantoj. La urbaj retejo, gazetoj, televido kaj radioj regule informados pri la evento.

La prezidanto de LEA vizitis la kulturcentron *Banga* kie okazos la plej gravaj programeroj (inaŭguro, koncertoj, fermo) se aliĝos multaj personoj kaj renkontiĝis kun d-ro Vytautas Petkunas, direktoro de la urba studcentro pri teknologioj kaj entreprenado, en kiu okazos la laborprogramo de BET-46.

Ĝis la jarfino al BET-46 aliĝis 70 personoj el Litovio, Latvio, Estonio, Ruslando, Slovakio, Ĉeĥio, Germanio, Danio, Finnlando, Svedio, Belgio, Sud-Afriko. Kutime BEToj en Litovio havas 250–300 partoprenantojn, kaj ankaŭ ĉi-jare oni strebos al amasa BET.

**Povilas Jegorovas**

## MES ĉe la Lazura Marbordo

Dum ankoraŭ frostas en via regiono, venu al Mediteraneo, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj kaj lazura maro en la Mediteranea Esperanto Semajno ekde 27 feb ĝis 6 mar 2010.

Dum vi lernos matene en unu el la tri diversnivelaĵoj kursoj, oni prizorgos viajn infanojn. Posttagmeze vi mem aranĝos vian programon: studado, promenado, piedirado en la montaro k. s. ĝis la vespero, kiam estas distra programo.

La studejo estas komforta hotelo *Le Renouveau* en Agay (ĉe Saint-Raphael). Restado kaj manĝoj por la tuta semajno: 280 eŭroj (por infanoj sub 14 jaroj: 168 eŭroj). Aliĝo al la kurso: 60 eŭroj (familia aliĝo: 100 eŭroj).

✉ Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, 83700 Saint-Raphael, Francio

☎ (33)4 94 83 06 88

✉ [prezmoni@hotmail.com](mailto:prezmoni@hotmail.com)

**Monique Prezioso**



Pri kio okupiĝas junuloj en la financa krizo? Iuj komune seminarias en Nankino...

## KS etendiĝos al novaj landoj

La Komuna Seminario, komenciĝis en la jaro 1982, kiam japanaj kaj koreaj junaj esperantistoj kunvenis unuafoje por diskuti la Esperanto-movadon en la du landoj. En 1995 Ĉinio aliĝis, kaj de tiam la tri landoj ĉiujare alterne organizas la seminarion kun temo de kulturo kaj Esperanto.

26–28 dec okazis en Nankino (provinco Jiangsu, Ĉinio) la 28a KS. La ĉi-jara ĉeftemo estas “Okupiĝo de junuloj en la financa krizo”. La inaŭguron en la Nankina Universitato ĉeestis ĉ. 50 junaj kaj korjunaj esperantistoj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio, kaj — unuafoje — tri el Vjetnamio. Poste la delegitoj el la kvar landoj prezentis sialandajn movadojn kaj opiniojn pri la ĉeftemo.

Evidentiĝis, ke en ĉiu el la kvar landoj estas la samaj problemoj: en la junularaj organizoj malmultas junuloj lerte uzantaj la lingvon, kaj la Esperanto-aktivado malofte okazas pro la kialoj de financo kaj tempo. Pro tio la junuloj ne havas ŝancon uzi la lingvon. Tamen kun la disvolviĝo de la reto, eble la problemo estos solvita. Jung Eun Kyung el Koreio diris, ke antaŭ du jaroj ŝi eklernis la lingvon kaj hodiaŭ jam povas sufiĉe bone paroli la lingvon danke al *Skype*, per kiu ŝi ĉiutage babilas kun esperantistoj.

La ĉeestantoj multe interesiĝis pri la aktivado en Vjetnamio. Nguyen Hoangyen, la 17-jara prezidantino de VJEO, rakontis ke ĉi tiu landa asocio fondiĝis en 2008 kaj havas pli ol 70 junulojn. Oni decidis, ke venontjare VJEO gastigos la sekvan KS.

**Chen Ji**

## Por la vera dialogo

Kadre de la Eŭrop-Unia projekto Komenius, ĉe la supera mezlernejo Braancamp Freire di Pontinha (Lisbono, Portugalio) okazis la dua internacia renkontiĝo kun grupoj de studentoj de IES Cuatro Caminos de la urbo Don Benito (Hispanio) kaj de la ŝtata mezlernejo “Cavour” de Modeno (Italio).

La projekto “Interkultura kaj multlingva Dialogo” utiligas Esperanton por ebligi la komunikadon inter la unuopaj grupoj kaj iliaj koncernaj naciaj kulturoj kaj lingvoj.

Krom viziti la interesegajn turismajn lokojn de Lisbono, oni dediĉis multe da tempo al la ĝisdatigo de la informteknikoj por la konstruo de la propra retejo de la projekto [www.multlingue.eu](http://www.multlingue.eu).

Profesoro de Braancamp Freiré akompanis nin en nia malkovro de la portugala lingvo kaj ĝia kultura medio. Ankaŭ Esperanto estis profunde studita, kaj gajigis la lecionojn profesoro Luizo Ladeira, kiu instruis al ni multajn belajn kantojn.

Inter la gejunuloj kreiĝis tiamaniere spontana deziro de komunikado kaj sincera amikeco; al tio kontribuis ankaŭ la fakto ke inter la junaj italinoj estas surda knabino kun apartaj komunikaj malfacilaĵoj kiuj solveblas per preciza komunika intenceco kaj per la signolingvo, kies alfabeto estis ilustrita de ŝi mem dum leciono en Braancamp Freiré.

Ĉiuj adiaŭis per koraj dankvortoj pro la bela tempo travivita kune kaj kun la bondeziro je nova renkontiĝo en Don Benito (Estremadura) en aprilo 2010.

**Ermanno Tarracchini, Valeria Bocchini, Luisa kaj Vittorio Madella**

## Unufraze

★ La Svisa Muzeo de la Ludoj, borde de la lago Lemano, inter Vevey k Montreux, danke al la klopodoj de la muzea kunlaboranto Cesco Reale, aldonis Eon al la lingvoj (franca, germana, angla, itala, rusa, hispana, portugala) elekteblaj por vizitoj k laborgrupoj. (Stefano Keller)

★ 16 okt 2009 en kvartalo Sarmiento de la Argentina urbo Presidencia Roque Sáenz Peña estis inaŭgurita bulvaro *Esperanto* en ĉeesto de la urbestro Gerardo Cipolini k pluraj lokaj aŭtoritatoj. (SEK-Bulteno)

★ EEU k Hamburga E-Societo intencas okazigi en majo 2011 Eŭropan konferencon en Hamburgo kun la temo “Kia estus nun Eŭropo, se EU neniam estus fondita?” kun Eo kiel unu el la laborlingvoj. (Eŭropa Bulteno)

★ Henri Masson, maltrankvila pri la sorto de E-aktivuloj en Haitio, sukcesis ekscii, ke Christine Théano en Porto-princo estas viva, sed Michelet Michel en Pétionville estas malsukcese serĉata de liaj parencoj. (Henri Masson)

★ Heidi Goes en novembro 2009 utiligis sian restadon en Indonezio por instrui Eon al entute ĉ. 500 personoj en Batam, Yogyakarta, Semarang, Bandung, Ĝakarta k Bogor, i.a., en tri universitatoj. (Esperanto)

★ Je 23 jan 2010 al la 95a UK en Havano aliĝis nur 515 personoj el 51 landoj, plej multe: el Francio 63, Japanio 51, Germanio 50, Brazilo 36, Italio 24, Nederlando 24, Pollando 18, Britio 16, Danlando 15, Kubo 14; je la sama dato antaŭ unu jaro la Bjalistoka UK havis 1057 aliĝintojn el 56 landoj. (uea.org)

★ La estraro de IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) decidis, pro manko de homrimedoj en la Okcidenta Eŭropo, malvigligi sian aktivadon k provi relanĉi la asocion en Kopenhago en 2011. (La Merkato)

★ La Estraro de UEA nomumis en decembro tri komisiitojn: Gabi Kosiarska (Pollando) fariĝis komisiito pri la Esperanta radiofonio, Emilio Cid (Brazilo) pri gazetara kampanjo lige kun UKoj; Robert Kamiński pri la dokumentado pri Zamenhof/Eo-objektoj. (GK UEA)

★ La internacia revuo por komencantaj aŭtoroj k komencantaj esperantistoj *Komencanto* ne plu aperos post la 12-jara eldonado, dum kiu aperis entute 78 numeroj. (Komencanto)



Chen Lina, aŭ simple Lina, gvidas la sabatan programeron *Esperanto en Marŝo*, prizorgas (kun Shanshan) la retan rubrikon E-Klubo kaj kontribuas artikolojn al *Mikrofono*.

## Dum 45 jaroj en la etero

(ĈIIC) 18 dec la Esperanto-Sekcio de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) solene festis la 45-jariĝon de la disaŭdigado en Esperanto. La festan ceremonion ĉeestis pli ol 80 samideanoj.

Dum sia parolado Guo Xiaoyong, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), gratulis la plenan sukceson de la Esperanto-Sekcio en la pasintaj 45 jaroj. Li diris, ke la Esperanto-Sekcio de ĈRI kaj ĈEL estas ĝemeloj, kiuj per Esperanto konigas Ĉinion al la mondo.

La vicdirektoro de ĈRI, Xia Jixuan esprimis sian esperon, ke la Esperanto-Sekcio de ĈRI daŭrigos la bonajn tradiciojn kaj kutimon de siaj veteranaj redaktoroj, kaj kontentigos per pli riĉaj programeroj kaj diversaj manieroj la bezonon de aŭskultantoj kaj legantoj.

Sekvante la videon en la ceremonio, la ĉeestantoj kune rememoris la evoluon de la Esperanto-sekcio de ĈRI dum la pasintaj 45 jaroj, kaj esprimis varman gratulon kaj sinceran bondeziron al la redaktoroj de la sekcio.

La teamo de la Esperanto-Sekcio de ĈRI



## Andaluzio: la unua AESF

Dekkvino da studemuloj 14–15 nov 2009 partoprenis la unuan Andaluzan Esperantologian Semajnfinojn (AESF) en Malago organizitan de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (Hispanio) kaj Kultura Centro Esperantista (Svislando).

La unua AESF estis intensa kurso pri la Esperanto-kulturo, specife la literaturo kaj la historio de la lingvokomunumo. La sabata sesio okazis ĉe la Civita Centro de Malago. La aranĝon antaŭis du fakaj lecionoj (pri la slavaj elementoj en nia lingvo kaj pri la simbolaro en ĝia kulturo). La lecionojn gvidis Giorgio Silfer, helpate de Perla Martinelli.

Dimanĉe AESF translokiĝis al la Junulara Gastejo en Malago, kie dum matena sesio Giorgio Silfer daŭrigis la instruadon pri literaturo, historio, sociologio, kaj oni ankaŭ ricevis sciojn pri lingvistiko kaj instrumentodiko.

La unua AESF samtempe utilis por prepari al lingvotesta sesio laŭ la Lingvotesta Sistema de la Esperanta Civito, kiu inkluzivas ankaŭ la kulturon, ne nur la leksikon kaj gramatikon, kaj proponas ĉiujn nivelojn laŭ la Komuna Eŭropa Framo de Referenco. Ses malganoj ricevis siajn diplomojn en diversaj studniveloj.

Julio Herrero

## GIL: la rolo de la personeco

“Mi estas kontenta pri la 19a jarkunveno de la [germana] Societo por Interlingvistiko (GIL), ĉar mi lernis multon, kaj ĉar venis pli da junaj homoj ol kutime, precipe studentoj el Leipzig”, — komentariis d-ro Detlev Blanke fine de la konferenco kiu arigis kvardekon da fakuloj el kvin landoj en Berlino 27–29 nov 2009.

La konferencoj de GIL traktas diversajn aspektojn de interlingvistiko: ilin partoprenas elstaraj lingvistoj, kiel prof. Johannes Klare, de Humboldt-Universitato, preleginta pri André Martinet. La ĉi-jara ĉeftemo “La rolo de la personeco en la historio de la planlingvoj” allogis dek tri prelegajn kontribuojn.

La publiko ne konsistis nur el esperantistoj, sed ankaŭ el idistoj kaj aliaj interlingvistoj: la konferencoj fakte okazas nur en la germana. De post kiam Itala Interlingvistika Centro ne plu organizas la siajn, ĉi tiu estas la unusola ekzemplo de ĉiujara interlingvistika konferenco en etna lingvo.

HeKo



## Nova milito por la franca

### Dafydd ab Iago el Bruselo

La franca prezidanto Nicolas Sarkozy volas militi por la franca lingvo. Por atingi pli da respekto al la lingvaj privilegioj, de kiuj profitas franclingvanoj en la Eŭropa Unio, li nomis eks-ĉefministron Jean-Pierre Raffarin reprezentanto de la prezidanto de la respubliko por la franca lingvo.

En januaro, Raffarin, senatano kaj membro de la konsilio de la Organizaĵo Internacia de la Frankofonio (OIF), venis al Bruselo por renkontiĝi kun la prezidanto de la Eŭropa Parlamento Jerzy Buzek, kun la prezidanto de la Eŭropa Konsilio Herman Van Rompuy, kaj kun la prezidanto de la Eŭropa Komisiono José Manuel Barroso. Krom siajn gepatrajn lingvojn kaj la anglan, Van Rompuy kaj Barroso flue parolas la francan. Nur la polo Buzek ne parolas la francan.

Post la renkontiĝoj, la franclingvano Raffarin miris, ke la portugalo Barroso kaj la flandro Van Rompuy ne uzas la francan en siaj publikaj komunikoj. La eksĉefministro malkontentitas ankaŭ pro tio, ke aliaj altranguloj en la Eŭropaj institucioj, perfekte sciante la francan, interkomunikiĝas angle. “La Eŭropa Unio parte havas ankaŭ franclingvan identecon”, — li klarigis al ĵurnalistoj.

“La hodiaŭa situacio de la franca ne estas kontentiga en la Eŭropa Unio”, — konstatis Raffarin. La reprezentanto de Sarkozy volis “sentebliĝi” la prezidantojn de la Eŭropa Parlamento, Konsilio kaj Komisiono. Tamen li ŝajne ne multe sukcesis ĉe ili. Laŭ Raffarin, Barroso klarigis, ke paroli france foje kreas “kirlobasenojn” en Bruselo ĉe la anglalingvemaj aŭskultantoj. Raffarin replikis, ke paroli nur angle ankaŭ faras la samon.

Raffarin venis kun malmulte da novaj ideoj. Li emfazis la gravecon de la instruado de la franca al EU-funkciuloj laŭ la programo lanĉita — kaj pagita de francaj impostpagantoj — en 2002. Ankaŭ gravas la “politiko de komunikado” en la diversaj eŭropaj administracioj.

La nova milito de Sarkozy kaj lia leŭtenanto Raffarin ne imponas en Bruselo. “La franca prezidanto ŝajne ne komprenas, ke homoj estas la ŝlosilo de la multlingvismo. Se la ĉefo ne parolas la francan, ĉiuj projektoj estas skribataj en la angla, lingvo kiu dissendas aliajn valorojn ol tiuj de la franca”, — rimarkis Jean Quatremer el la franca tagĵurnalo *Libération*.



Jean-Pierre Raffarin pledas por forta ĉeesto de la franca.

Alia malvenko en la politiko de Sarkozy estis la elekto de la unulingva anglino Catherin Ashton kiel estrino de la Eŭropa diplomatio kaj kiel la vicprezidantino de la Komisiono. Raffarin promesas insisti ĉe Ashton por ke ŝi havu “sufiĉan” ĉeeston franclingvan en sia kabineto.

Raffarin donis novan ekzemplon de la nurangleco — la gazetaraj komunikoj de la Komisiono kaj de la unulingva anglino Ashton estis farataj unue nur angle. La franca politikisto ankaŭ timas pri la manko de franclingvanoj kiel porparolantoj de la Komisiono (nur unu francino kaj unu brit-francino). Alia problemo estas, ke la oficejoj de la anoj de la Komisionoj supermezure pleniĝas per anglalingvanoj. “Restas grandega laboro por fari, — diris Raffarin. — Ekde la komenco Eŭropo kultivis francan potencialon kaj al ĉi tio estis aldonita akvo poste”.

“En la Eŭropa Parlamento oni diras al mi, ke ĉion fari angle pli facilas kaj malpli kostas. En la Komisiono oni diras al mi, ke ĉion fari angle pli facilas kaj pli rapidas”, — li plendis.

Raffarin alvokas ŝanĝi la taktikon kaj agi. Li memorigis al ĵurnalistoj la incidenton, provokitan de anglalingvema franco en la ĉeesto de Jacques Chirac. La eksprezidanto de la franca respubliko eliris el debato, ĉar tiama — franca! — ĉefo de la eŭropaj dungantoj, Ernest-Antoine Seillière, parolis angle. “Oni devas organizi ĉi tiun demandon frankofonan. Ne temas pri tio, ke ĉiuj parolu france, sed pri tio, ke estu forta ĉeesto de la franca”, — diris Raffarin.

## Kiu lingvo por Eŭropo?

Sekve de invito de Barroso al la eŭropanoj partopreni en publika konsultiĝo pri strategio de la Eŭropa Unio (EU) por la sekva jardeko, la sekretario de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), Zlatko Tišljär, verkis proponon por EU, kiu antaŭvidas, pro granda kvanto da islamanoj en Eŭropo, edukadon de junaj generacioj pri toleremo kaj interkultura dialogo kaj konsciigadon de la tuta loĝantaro pri komuna EU-identeco baze de la Eŭropaj valoroj, kiujn la Eŭropaj islamanoj, alireligiuloj kaj nereligianoj povu alproprigi same emocie kiel siajn naciajn identecojn. Laŭ Tišljär, tio eblos nur se en ĉiuj EU-landaj lernejoj oni enkondukos edukadon por Eŭropa konscio kaj

Eŭropaj valoroj, kies grava parto estas la Eŭropaj simboloj.

Konsiderante estontan akcepton de Turkio al EU, Tišljär opinias necesa antaŭe atingi interkonsenton en EU pri evoluigo de la EU-identeco per edukado kaj per akcepto de la komunaj simboloj. La himno, blazono, flago k.s. jam ekzistas, sed ne la Eŭropa lingvo, kiu, same kiel la himno kaj flago, devas esti ne nacia, sed neŭtrala: elektita inter la mortintaj lingvoj (latina aŭ helena), aŭ inter la novlatinidaj planlingvoj (Esperanto).

La sekretario de EEU klarigas, ke la altrudo de la angla (parte) solvas nur la komunikan problemon de la instancoj, sed tute ne solvas la komunikan problemon de plimulto de la loĝantaro de EU, malgraŭ tio ke la angla jam preskaŭ

forpulis el la lernejoj ĉiujn aliajn fremdlingvojn. Tiu stato ĉiam pli malbonigas la deziratan evoluigon de la Eŭropa identeco ĉe eŭropanoj. Ĉiam pli multaj malŝatas EU-on pro tio, ke ĝi devigas la eŭropanojn identiĝi per la angla lingvo. Identiga lingvo povas esti nur neŭtrala, kiun ĉiuj akceptos kiel la Eŭropan, kiun ili lernos apud siaj lingvoj naciaj kaj regionaj, ne komprenante ĝin kiel klopodon de angloj superregi en EU.

“EU dum jardekoj ne volas vidi tiun problemon, kaj ĝi ne komprenas, ke tio — simile al la rusa en Sovetunio aŭ serba en Jugoslavio — kondukos al malŝato de la komuna ŝtato kaj pretigos terenon por disfalo, kiam politika, religia aŭ ekonomia krizo fortiĝos”, — Zlatko Tišljär konkludis.

**AiKo**

## Denove pri akcento en kunmetitaj vortoj

Tiklis mian atenton la eseo de Ryszard Rokicki pri “akcento en kunmetitaj vortoj” en la januara *Ondo*. Por solvi tiun problemon la aŭtoro sugestas, ke oni anstataŭigu la dekan regulon de la *Fundamenta Gramatiko* per “la akcento aperas sur la lasta silabo de la radikalo (resp. radikalo)”, kio vekis ĉe mi profundan pripensadon.

(1) Mi ne komprenas la bezonon de la parentezo en la difino. Matematikistoj kutime uzas “resp.” en tekstopeco almenaŭ dufoje, sed eble lingvistoj faras alie. Mi ĉiuokaze preferus reskribi: “la akcento aperas sur la lasta silabo de la radikalo”, kio evidente inkluzivas la okazon de radikalo egala al radikalo, ĉar sen afikso.

(2) La aŭtoro preskribas, kiel akcenti kunmetaĵojn, nur per la elipsa direktivo “estas la leganto, kiu decidus, ĉu akcenti la silabon aŭ ne”, kion mi pli konkrete traduku per “en kunmetaĵo la ĉefelemento konservas sian akcenton” (alie oni konsiderus “ór-ĉeno” ĝusta), “kaj la flankelemento, laŭ la bontrovo de la parolanto, povas porti la akcenton preskribitan de la nova 10a regulo, aŭ ne” (do “órĉeno” aŭ “orĉeno” indifere).

(3) La nova regulo havas la malavantaĝon uzi la terminon “radikalo”, kiun oni povas difini nur, se oni antaŭe difinis la noción “afikso”, kio povas montriĝi tikla.

(4) La nova regulo malebligas, ke radikalo havu pli ol unu akcenton, kio estas neoportuna ĉe radikaloj kun longa radikalo aŭ granda nombro da sufiksoj (ekz-e en “eks-parlament-aĉ-an-in-ét-o” aŭ “eks-fi-ge-ek-mis-kondukt-int-oj”).

(5) La nova regulo instruas, ke oni akcentu “matenmángo” aŭ “maténmángo”, sed ne “mátenmángo”, kiu tamen uziĝas. Sur kiu bazo oni rifuzu ĉi-lastan? Ja la priskribo de la situacio de tiu vorto en PMEG sufiĉe konvinkas min.

(6) La nova regulo instruas, ke oni akcentu “apúd”, “pre-tér”, “neniél”, “adiáŭ”, kion espereble neniu faras (krom ŝtipkapaj francoj). Almenaŭ la Fundamento, en Ekzerco N°3 preskribas “neniél” kaj “adiáŭ”.

(7) La nova regulo lasas liberecon akcenti la kunmetaĵojn de la tipo “dudek” kiel “dudék” aŭ “dúdék”, kio mianopinie kontraŭas la kutiman kaj Fundamentan “dúdek”.

(8) Post tiom da negativajoj mi konfesu, ke la nova regulo havas unu gravan avantaĝon, nome ĝi ebligas ne perforti la regulon ĉiufoje, kiam oni elparolas eliziitan substantivon: ja “matén” havas samlokajn akcenton, kiel “maténo”, kio laŭ la vera 10a regulo ne devus okazi. Tamen, se oni volas ĉikani, oni observu, ke la “lasta silabo de la radikalo”, nome “tén” ne troviĝas en la vorto “ma-té-no”...

Marc Bavant

## Ĉu ĵurnalismo?

En la artikolo pri *Literatura Foiro* (rubriko *Nia trezoro* en *LOde*, 2009, №11, p. 20) legeblas eĉ ne unu kritika vorto pri tiu revuo. Ĉio estas laŭdoj, kvazaŭ la artikolon verkis avataro de Perla Martinelli mem, aŭ kvazaŭ la aŭtorinon narkotus la jam 40-jara redaktodaŭro. Se la redakcejo de *LOde* opinias tian panegiran prezenton ĵurnalismo, ili prefere fermu la butikon.

Jorge Camacho

**Ne forgesu (re)aboni**

## Pro la reciproka ĵaluzeco

Ja vere pravas la “observanto” en la artikolo *La sendanĝera bonhumora ĉefo de EU* (*LOde*, 2010, №1, p. 10). Tiu elekto de la plej gravaj reprezentantoj de EU aspektas kiel plej malbona kompromiso kaj ne altigos la internacian prestiĝon de EU en la mondo. Sed la elekto estas klara rezulto de la nuna situacio en EU, sendube oni havus multajn bonkvalitajn, lertajn, spertajn kandidatojn el la unua vico de politikistoj, sed la reciproka ĵaluzeco inter la popoloj kaj interesgrupoj ne permesis pli bonan rezulton.

Ekzemple, la propono elekti sinjoron Blair estas same (kiel la baronino Ashton) ne akceptebla. La brita registaro, la brita popolo absolute ne interesiĝas pri Eŭropo, ili kontraŭstaras ĉion, kio venas el la “kontinento”. Laŭ mia scio, ili eĉ ne pagas sian plenan kotizon al EU-kaso, ĉar ili havas “apartajn kondiĉojn”, ili nek enkondukis EU-leĝojn, nek la monon eŭro, nek internaciajn mezurojn... Ili sentas sin ne eŭropanoj, sed tre bonfartas kiel pinto de sia iama imperio. Do, proponi briton/britinon por la pinta posteno de EU jam en si mem estas impertinentaĵo por la EU-parlamento. Sed elektita estas elektita, nun ili agu kaj montru, kion ili kapablos, ofte la kritikistoj eraras.

Verner Pfennig

## La Ondo super ĉiuj tendencoj

Mi legis, ke “Aleksander Kotjenkov ... estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2009 pro la ampleksa kaj zorga esplorado de la vivo, verkoj kaj ideoj de Zamenhof kaj pro tiutemaj verkoj kaj prelegoj, speciale pro la libro *Homarano...*”

Mi certe ŝatus aldoni, ke vi meritas esti en la listo de la Esperantistoj de la Jaro interalie ankaŭ (se ne multe pli) por la multjara eldona agado rilate al libroj kaj al *La Ondo*. Mi tre ĝojas, ke vi sukcesas esti per *La Ondo* super ĉiuj tendencoj kaj simple prezenti faktojn, okazaĵojn kaj opiniojn. Pro tio mi aparte gratulas al vi okaze de via elekto!

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand

La 21an de decembro 2009 forpasis

**Alois Hauptenthal (1918–2009)**

la patro de la konata esperantisto kaj interlingvisto Reinhard Hauptenthal.

22 dec 2009 post longa malsano en Vilno forpasis

**Konstantinas Puodėnas (1923–2009)**

ekonomikisto kaj financisto, esperantisto ekde 1938, longatempa sekretario de la Vilna EK, kompilinto de instruprogramo pri Esperanto por litovaj mezlernejoj, tradukanto kaj leksikografo, aŭtoro de la populara dudirekta Esperanta-litova kaj litova-Esperanta vortaro (1988).

26 dec 2009 en Sofio forpasis

**Dimitar Haĝiev (1920–2009)**

juristo, interpretisto kaj diplomato, esperantisto ekde la gimnazia aĝo, aktivulo en la bulgara movado kaj en MEM, honora membro de BEA, honora prezidanto de Komunista Esperantista Kolektivo, redakciano de *Literatura Foiro*.

14 jan 2010 forpasis

**Juliusz Kolbusz (1919–2010)**

aktiva pola esperantisto, estranano de PEA-filio en Tarnów.

*Ni funebras kaj kondolencas.*

## Poemoj de Mao Zifu



### Songĝoj

tage.

lampo funkcias kiel suno  
kaj la ĉelo estas la ĉielo.  
sen flugiloj mi flugadas  
de la oriento al la okcidento.  
tro da racioj kaj logikoj  
planigas min pri ebla onto.  
mi devu tiel agi ne kiel kutime.  
la dua mi ordonas:

trinku akvon sed ne vinon,  
spiru aeron freŝan sed ne fumu cigaredon,  
parolu kun viroj sed ne kun virinoj,  
karesu la vizaĝon sed ne vin masturbu...  
la regularo regas kaj la manojn kaj la koron.  
frida akvo estingas la fajron.

nokte.

la luno fariĝas la neona lampo  
kaj la kaĝo estas kosmo.  
senformaj flugiloj portas min  
vojaĝi de la okcidento al la oriento.  
for de katenoj instinkto  
aranĝas paseojn laŭplaĉe.  
la unua mi permesas:  
drinki ĝis vi forgesos ĉiujn vundojn,  
fumi per kamentubo arbaregon por noktizi tagon,  
kolombumi kun virinoj tentaj,  
karesi iliajn mamojn kaj penetri en ilin...  
ribelo ellasas impulson kaj revon.  
varma suko akvumas la lagon sekan.

diurne

mi songas pri la du mioj.  
ili militas inter karno kaj spirito.  
ilin ne povas paciĝi ismo, religio kaj moralo.  
kiam la suno ne aperos,  
kiam la luno iĝos suno,  
eble ĉio restos kiel lampo komandebila.  
sed verŝajne, nur kiam la sango  
ne plu fluos en la korpo  
kaj la kapo estos vazo kun sableroj,  
la batalo ĉesos kaj la mioj ne alias ol pulvoro.  
tamen, ne leviĝu vento!  
eĉ se la pulvoro digestiĝos en la maron,  
mi pulsos kun la ondoj.

2009-12-24

Skribas Jorge Camacho, en sia recenzo pri la poemaro *Kantoj de Anteo* (*Beletra Almanako*, 2007, №1, p. 91–97): “En 1985, ĉinan instruiston 22-jaran renversis traktoro stirata de sam-aĝulo. De tiam li, Mao Zifu... rezulte sidas paralizite sur radseĝo. Intertempe li eklernis esperanton kaj fariĝis la plej frukto-dona kaj promesplena ĉi-lingva poeto de la nuna jarcento”.

Eĉ: Marc van Oostendorp ([everk.it/index.php?id=21,142,0,0,1,0](http://everk.it/index.php?id=21,142,0,0,1,0)) nomas *Kantoj de Anteo* “la plej potenca poemaro kiun mi iam ajn legis en Esperanto”, “multe pli bona ol, ekzemple, *La Infana Raso* de Auld <...> Ĉio estas pli interesa ĉe Zifu: la temaro, multe pli profunda, foje pli sovaĝa, pli despera <...> Kaj precipas ankaŭ la tono, la stilo <...> Senprobleme la poeto ŝaltas de okcidentaj troĥeoj al japane hajkuecaj versoj, de la greka mitaro (Anteo) al hindua filozofio, de libera verso al rimo. Krome li abunde uzas la eblojn de la lingvo”.

Re al Camacho: “...evidentas la absoluta, turnopunkta graveco de la traktor-akcidento en la vivo de Mao. Samkiel tagon post tago Sizifo renkontas novan puŝotan rokon, tiel Mao ĉiumatene vekigas en paralizitaj korpo kaj ĉambro. Tamen, kial ne Sizifo – sed ja Anteo? Laŭ la greka mitaro, Anteo estis giganto, filo de Pozidono kaj Gea (la Tero); li ĉiam venkis en luktoj ĉar, falinte sur la teron aŭ tuŝante ĝin, lia patrino Gea redonis al li fortojn; por povi sufoki Anteon, Heraklo devis levi lin super la teron. «Anteo sur rulseĝo», skribas Mao. La akcidento kaj lia invalideco (aŭ handikapo) neeviteble iĝas simbolaj. Sed oni prefere rezistu la tro facilan tenton legi ĉion kiel gloson al la maa situacio”.

Sed ne rezistu la tenton legi ĉion kio venas el la klavaro, menso kaj koro de Mao Zifu.

István Ertl

### Amo kaj amoro

Ĉirkaŭ mi troviĝas multe da virinoj.  
ili min amas kaj mi amas ilin.  
por ni necesas kaj sufiĉas —  
babili pri la koro kaj la korpo,  
promeni en parkoj kaj sur placo,  
viziti manĝejojn kaj bazarojn,  
lerni la lingvon, komputikon...  
jes, kune, ofte duope.  
sed iam manpremi tamen neniam mampremi.  
koron ĉe koro,  
ŝultron ĉe ŝultra,  
la brusto restas for de la brusto.  
entuziasmo klimatizas la sezonojn kiel nur printempon.

en interreto mi renkontas iujn inojn.  
pro scivolemo aŭ pro zorgo  
ili min demandas pri amoro.  
koron for de koro  
ni iam intervidas la mamparon.  
la kameraoj montras nur la karnajn  
sed neniel la spiritajn.  
tio ja estas amo platona.  
la kisoj per la manoj  
sentigas nenian varmecon.  
la distanco de mil mejloj  
ekigas printempon iĝi vintro en sekundo.

kiam venus bela cigano?  
niaj karnoj kaj spiritoj kunfandiĝu!  
koron ĉe koro  
kaj bruston ĉe brusto,  
ni interkomuniku kaj varmecon kaj pasion  
plenajn de ŝvitoj kaj sukaj.  
la kvar sezonoj ŝanĝiĝas ekstere  
sed printempo restas ĉiam en la ĉambro.

2009-12-23

## Viktimoj. Sur sanga tero

**Julio Baghy** naskiĝis en 1891 en teatra familio; junaĝe li studis aktoradon, sed kiam komenciĝis la mondmilito li soldatiĝis kaj dum 1915–1920 estis militkaptito en Siberio dum militoj kaj revolucio. Tie li komencis sian agadon kiel Esperanta verkisto, instruanto kaj aktivulo. El tiu periodo fontas multaj el liaj poemoj, noveloj kaj romanoj Esperantaj. Pro la pozicio de Baghy kiel “Paĉjo” de la tuta esperantistaro, tiu medio de militkaptitoj en Siberio iĝis fundamenta parto de la Esperanta literaturo.

La du romanoj *Viktimoj* (1925) kaj *Sur sanga tero* (1933) formas rakonton pri aro da kaptitoj civilaj kaj soldataj, rusaj kaj alilandaj, en Siberia mallibereco. La du verkoj legeblas aparte, tamen ili esence formas tutaĵon. Inter la multaj personoj aperantaj la ĉefa protagonisto estas Johano Bardy, kiu iusence rolas kiel alia memo de Baghy.

Kvankam do temas pri du partoj de unu sama rakonto, tamen la du verkoj malsimilas en pluraj manieroj. La unua verko, *Viktimoj*, estis la unua proza verko de Baghy. Ĝia strukturo estas ege teatra; efektive la romano konsistas el aro da scenoj teatraj kun tre malmulte da kunliga rakonta prozo. En *Sur sanga tero* male superregas rakonta prozo, en kiu enplektiĝas scenoj kaj dialogoj. Evidente, dum la ok jaroj inter la du romanoj Baghy evoluigis sian rakontan teknikon. La teatra karaktero de *Viktimoj* certe estas sekvo de limigita sperto kaj kompreno pri proza rakontado. Cetere, ankaŭ en *Sur sanga tero* kelkaj scenoj ŝajnas relative teatraj. Baghy, same kiel lia protagonisto Bardy, estis aktoro, reĝisoro, ĝisosta teatristo.

En *Viktimoj* la aŭtoro maksimume uzas sian talenton de teatristo eĉ ĝis tiu grado, ke la dramaj eventoj ŝajnas okazi plie sur scenejo ol en reala Siberio. Tiu sinsekvo el scenoj tamen dum la tuta verko kaptas la atenton de la leganto. En *Sur sanga tero* li adoptis tradician romanan teknikon, kiu tamen ne estis lia natura elemento. La rezulto estas, ke inter la rakontaj partoj kaj la scenoj kelkfoje troviĝas breĉo, kiun li ne sukcesas bone transponti.

Dum en *Viktimoj* ĉefan atenton kaptas la individuaj militkaptitoj kaj iliaj interrilatoj, en *Sur sanga tero* la perspektivo estas pli vasta. Ĝi priskribas la historian evoluon en orienta Siberio



dum la lasta parto de la postrevolucia milito. El tiu ĝenerala perspektivo ni kvazaŭ zome eniras la medion de civilaj malliberuloj, kiuj vivas eĉ pli mizere ol la kaptitaj soldatoj. Ni nun retrovas la protagoniston Johano Bardy inter tiuj civilaj kaptitoj, kies sorto dependas de la milito inter diversaj armeoj enlandaj kaj invadantaj.

Pluraj figuroj en la romanoj estas sufiĉe karikature skizitaj, tamen individuue. Baghy efektive havis nekutiman talenton krei individuajn rolantojn, kiujn oni baldaŭ rekonas kaj memoras, kaj pri kies sorto oni scivolos. La protagoniston Bardy oni kutime identigas kun Baghy. Tamen, se li sola reprezentus la aŭtoron, ĉiuj hezitoj, duboj, konfliktoj en la verkista konscio devus aperi kiel interna pensofluo. En teatro tiaj aferoj devas aperi kiel dialogo inter du personoj sur la scenejo. Do en *Viktimoj* Baghy kreis “duan alian memon”, *Petro Doŝky*, kun kiu Bardy senĉese diskutas kaj disputas. Ili estas maloj, tamen plej bonaj amikoj, kaj sendube oni povas rigardi ilin kiel du duonojn de la aŭtoro. En *Sur sanga tero* tiaj dialogoj okazas inter Bardy kaj pluraj figuroj, interalie la simpatia rusa leŭtenanto Stričkov.

La du romanoj prezentas la militon en Rusio kaj la kondiĉojn de la militkaptitoj tre draste kaj senvuale. Homoj mortas kaj mortigas, malhonoras kaj estas torturataj. Tamen ĉi dramaj eksteraj eventoj ne estas la baza temo de la verkoj. Baze la du Siberiaj romanoj de Baghy ne temas pri Siberio, pri milito kaj revolucio, sed pri la internaj dilemoj kaŭzataj de homaj rilatoj. Kulpo, sinkakuzoj, konscienciproĉoj, jen kelkaj el la veraj temoj. Precipe temas pri rilatoj

de la ĉefaj viroj al virinoj proksimaj kaj foraj. Pri tio grandparte temas la disputoj de Bardy kaj Doŝky, sed ankaŭ ĉe aliaj roluloj ofte ĉeestas ĉi tiu temo.

Se la ĉefaj viraj rolantoj de la libroj ofte estas plurdimensie elformitaj, la samon ne eblas diri pri la virinoj. Ili estas aŭ demono aŭ anĝelo. En *Viktimoj* la du ĉefaj virinoj estas la oficiredzino Katja kaj la mistraktita knabino Fiza. Ambaŭ amas Johanon Bardy, sed dum la unua volas posedi kaj pereigi lin, la amo de la dua estas “pura” kaj rezignema. Ankaŭ en *Sur sanga tero* ĉi tiu temo restas, ĉefe en formo de la rilato amika-ama inter Bardy kaj Poliena, kiu perdis siajn edzon kaj infaneton. Sed ankaŭ tie aperas Fiza, nun en alia rolo, tamen ankoraŭ kun sia senespera amo, kaj ankoraŭ, laŭ la vortoj de Bardy, “anĝelkora ĉiesulino, en kiu la partia disciplino ne povas tute subpremi la virinon”.

La rilato inter Johano Bardy kaj Poliena estas prezentata kiel amo nebula, neplenumata. La obstakloj al ilia amo konsistas ĉefe en iliaj vivoceloj. Poliena volas resti en Rusio agante por la revolucio, dum Bardy sentas devon reveni al sia hejma Hungario, kiam tio eblas. Finfine tiu intenco ankaŭ realiĝas, sed la dilemo restas en lia interno, kaj la libro finiĝas per lia sindemando: “Poliena, ĉu estis inde reveni?”

Baghy estis ankaŭ humuristo. Precipe en la unua el la du verkoj multaj scenoj plenas de milda humuro, en kiu ofte kaŝiĝas profunde pensigaj temoj. Tio validas interalie pri la figuro Izor Steiner, Transilvania judo prezentata kiel kliŝa judeto, malkuraĝa sed ruza, kiu tamen iom post iom montriĝas tre saĝa porparolanto de paco kaj toleremo. En la dua verko aperas alia humura figuro, la hungara tajloro Mihok, konata ankaŭ el la novelo *Kiam Mihok instruis angle*, eble la plej fama humura novelo en Esperanto.

Ne facilas trovi konvenan finon de tiel granda verko kiel la du Siberiaj romanoj. Post tre drama kaj ekscita kulmino kaj fino de la ĉirkaŭaj militagoj, aperas iom tro da koincidoj inter la rolantoj. Escepte de tiuj detaloj, la fino de la verko tamen estas bona kaj logika, kun elstarigo de la ĉeftemoj: interhomaj rilatoj kaj internaj homaj dilemoj.

La du romanoj kune formas klasikajn en la Esperanta literaturo, kiu facile, plezure, pensige kaj ĝue legeblas ankaŭ hodiaŭ.

**Sten Johansson**

## Nia libroproduktado en la jaro 2009

Ĉiujarajn statistikojn pri la libroproduktado ni stafete reprenis en 1991 de *Hungara Vivo*, uzante informojn el la rubriko *Laste aperis* de la revuo *Esperanto*. Ĉi tiu rubriko listas ĉiujn librojn, kiujn la libroservo de UEA ekvendis dum unu plena jaro, sendepende de la eldonjaro. Ĉar ne ĉiu eldonita libro estas vendata de UEA kaj ĉar ne nur freŝe eldonitajn librojn ĝi ekvendas, ni aperigas ne nur jartabelojn, sed ankaŭ resumajn tabelojn, kiuj estas pli reprezentaj.

La tabelojn akompanas nur mallongaj komentoj, ĉar ili estas ĉiujare preskaŭ samaj, sed post unu jaro la komentoj estos pli multaj, kaj enestos komparo de la jardekoj 1991–2000 kaj 2001–2010.

Dum 2009 surmerkatiĝis 158 libroj, plej malmulte en la lastaj jaroj, kun entute 24 mil 272 paĝoj. En 2008 estis 201 libroj kun 25 mil 381 paĝoj. La malkresko okazis ne pro velko de la eldonado, sed pro neeblo aperigi ĉiujn informojn en la revuo *Esperanto*, kiu en la Zamenhofa jaro estis troŝarĝita de zamenhofologio. Jam en la januara *Esperanto* (2010) menciigis pluraj libroj, notendaj tuj post la kongreso. Interesa fakto: dum la magra jaro aperis rekorde multaj originalaj beletraĵoj (27).

Post du jaroj da “ĉampioneco” de Stano Marček, kiu eldonadis multajn lingvajn versiojn de sia lernolibro, ĉi-jare la liston unuafoje malfermas MAS (Monda Asembleo Socia), prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kun 14 libr(et)oj politikaj kaj sociaj de maldekstraj aŭtoroj klasikaj (kelkaj de Markso) kaj modernaj, kiujn plejparte li mem tradukis.

### 2009. Libroj

MAS (FR) . . . . .	14
Impeto (RU) . . . . .	10
FEL (BE) . . . . .	8
W.Nüesch (CH) . . . . .	6
Kataluna E-Asocio (ES) . . . . .	5
Ĉina Fremdlingva Eld. (CN) 4	
Edition Iltis (DE) . . . . .	4
Mondial (US) . . . . .	4
Riveroj (JP) . . . . .	4
UEA (NL) k.a. . . . .	4

### 2009. Paĝoj

FEL . . . . .	2519
Ĉina Fremdlingva Eld. . . . .	1976
Impeto . . . . .	1877
MAS . . . . .	1790
Litova E-Asocio (LT) . . . . .	839
W.Nüesch . . . . .	722
Sveučilišna knižara (HR) . . . . .	688
Mondial . . . . .	680
Sezonoj (RU) . . . . .	632
Riveroj (JP) . . . . .	560

La resumaj libro- kaj paĝo-listoj por 19 jaroj restis preskaŭ la samaj kiel por 18 jaroj kun nur kelkaj lokŝanĝoj inter la eldonejoj. Nur unu ŝanĝo estas grava: la eldonejo de la Flandra Esperanto-Ligo ekgvidis la paĝoliston, danke al la ĉefverko de Darvino kaj aliaj “dikaj” libroj eldonitaj ĉi-jare.

### 1991-2009. Libroj

UEA . . . . .	138
Libro-Mondo (PL) . . . . .	130
FEL . . . . .	106
Fonto (BR) . . . . .	81
Impeto . . . . .	77
Sezonoj . . . . .	76
KAVA-PECH (CZ) . . . . .	62
Edition Iltis . . . . .	60
Bero (NL) . . . . .	58
Ĉina E-Eldonejo (CN) . . . . .	55

### 1991-2009. Paĝoj

FEL . . . . .	18075
Libro-Mondo . . . . .	16914
UEA . . . . .	15993
Fonto . . . . .	12734
Sezonoj . . . . .	12570
Arĥivaro E.Privat (CH) . . . . .	12553
Impeto . . . . .	12494
Ludovikito (JP) . . . . .	12085
Ĉina E-Eldonejo . . . . .	11796
KAVA-PECH . . . . .	11284

La landlisto eble ŝajnas surpriza pro la nealta loko de la kongreslando, sed pluraj ĉirkaŭkongresaj eldonaĵoj ne estis registritaj pro la menciitaj cirkonstancoj en la revuo *Esperanto*.

### 2009. Libroj

Francio . . . . .	28
Germanio . . . . .	15
Ruslando . . . . .	13
Belgio . . . . .	11
Japanio . . . . .	10
Pollando . . . . .	9
Ĉinio . . . . .	7
Nederlando . . . . .	7
Slovakio . . . . .	7
Svislando, Usono . . . . .	7

### 2009. Paĝoj

Francio . . . . .	3221
Belgio . . . . .	2865
Ruslando . . . . .	2509
Ĉinio . . . . .	2395
USA . . . . .	1444
Germanio . . . . .	1277
Litovio . . . . .	1257
Japanio . . . . .	1187
Hungario . . . . .	1176
Kroatio . . . . .	1106

En la resuma laŭlanda librolisto restis la samaj landoj. En la paĝolisto malaperis Italio kaj Ĉinio aperis. Ni vidos, ĉu Francio devancos Germanion post unu jaro.

### 1991-2009. Libroj

Germanio . . . . .	357
Francio . . . . .	355
Pollando . . . . .	296
Nederlando . . . . .	270
Ruslando . . . . .	229
Japanio . . . . .	205
Brazilo . . . . .	204
Usono . . . . .	171
Italio . . . . .	149
Belgio . . . . .	143

### 1991-2009. Paĝoj

Germanio . . . . .	42891
Francio . . . . .	40869
Japanio . . . . .	37412
Ruslando . . . . .	34290
Pollando . . . . .	34045
Nederlando . . . . .	29577
Brazilo . . . . .	29160
Svislando . . . . .	23121
Belgio . . . . .	22488
Ĉinio . . . . .	21392

En 59 libroj estas indikoj pri tradukiteco. Plej multaj tradukoj estas el la germana (16) kaj franca (13), kaj nur 3 el la angla, sed la angla konservas la unuan lokon en la resuma tabelo (137 libroj) sekvate de la franca (135) kaj la germana (126).

**Aleksander Korĵenkov**

	1991–2000 (sume aŭ averaĝe)	2001	2002	2003	2004	2005	2006	2007	2008	2009
Nombro de libroj en/pri Esperanto	2107	222	174	224	183	159	204	184	201	158
Suma paĝonombro de ĉiuj libroj	251.276	31.520	26.451	28.424	27.295	23.780	30.078	31.183	25.381	24.272
Nombro de la eldonintoj	650	109	95	133	103	87	114	93	104	88
Averaĝa paĝonombro de unu libro	120.3	142	152	127	149	149	147	169	126	153
Averaĝa prezo de unu libro (eŭroj)	8,22	11,2	11,6	10,3	10,8	12,7	11,7	12,0	10,2	11,77
Lernolibroj, vortaroj pri Esperanto	296	32	43	42	25	19	32	36	29	17
Originala beletro	258	21	18	24	21	14	23	23	23	27
Traduka beletro	458	57	18	32	45	40	35	36	28	20
Planlingvistiko, esperantologio, ling.	229	26	19	15	13	22	21	21	32	26
Esperanto: historio, movado k.s.	241	21	42	33	32	27	29	28	26	23
Politiko, historio, filozofio, socio	166	22	11	28	21	22	29	13	28	25
Scienco kaj tekniko, terminaroj	182	17	8	16	10	4	10	8	8	6
Religio	105	6	10	17	6	6	13	9	13	7
Aliaj temoj	172	20	5	17	10	5	12	10	14	7

# 2010 - abunda jaro por Esperanto-muziko

**K**vankam grava diskokrizo frapas kaj ŝanĝas la muzikpejzaĝon kaj la kutimojn de la homoj, 2009 estis grava jaro por muziknovaĵoj en Esperanto. Multaj projektoj realiĝis kun la eldono de neridinda kvanto da albumoj: *Fek al Esperanto* de La Pafklik, *La ruĝa albumo* de Ĵomart & Nataŝa, *Aventur' de Kapriol'!*, *Carina kantas por vi en Esperanto* de Carina (Filino de Ĵomart & Nataŝa), *Esperante de Espo Despo, Repe, ritme, sone...* de Tone, *Sur placen venu vi de Kaj Tiel Plu*, *La Hiphopa kompilo Vol.1* (HHK Vol.1).

Krom la diskeldonado, io grava venis por riĉigi la muzikan elekton kun la stariĝo de la elŝutretejo [www.vinilkosmo-mp3.com](http://www.vinilkosmo-mp3.com) de *Vinilkosmo*, kiu devis adaptiĝi al la evoluo de la novaj teknikoj por distribuado de muziko kaj tiel kompensi la malkreskon de la intereso por la fizika sonportilo (disko, vinilo, KD kaj MD aŭ ankaŭ sonbendo, kaj kasedo).

La teamo de *Vinilkosmo* pasigis grandan parton de la jaro por surpiedigi tiun novan retejon por disponigi laŭ leĝa elŝutado Esperanto-albumojn laŭ MP3 kaj OGG formatoj en la reto. Tial aperis la unuaj virtualaj albumoj en Esperanto eldonitaj kaj distribuataj en la reto. Tiel la albumoj *Revolucio en pajleraro* de Ale Kosabela kaj la reeldono de *62 Minutoj de Persone* (la kasedo, aperinta en 1987, estis ciferecigita kaj remastrigita) nun estas disponeblaj laŭ MP3 sed ankaŭ laŭ la kvalita senperda formato FLAC en la elŝutretejo de *Vinilkosmo*.

Tio do malfermis ankaŭ la pordon al aliaj provoj kiel ekzemple Eterne Rima kiu aperigis virtualan kvartitolan albumeton *Por la rep'* (eldonita kaj libere elŝutebla por varbi la aperontan albumon) aŭ ankaŭ la virtuala *Hiphopa kompilo* disponebla libere en la reto.



En septembro 2009 *Vinilkosmo* aliĝis al "cd1d" (federacio de sendependaj eldonejoj) kaj malfermis tie paĝon <http://www.cd1d.com/vinilkosmo-m-144.html> por disponigi elekton de siaj eldonitaj albumoj de Esperanto-artistoj laŭ la formato FLAC kaj por tiel ankaŭ vekii intereson al Esperanto-muziko en la ekstera sendependa muzikmovado. Tio



Konga Espero celas al Afrika Kompilo.

certe kontentigos tiujn, kiuj postulas apartan kvaliton kiun ne povas doni MP3 aŭ OGG, kiuj estas perdaj formatoj...

La pasinta jaro do preparis la grundon por estontaj muzik-projektoj. 2009 estis ĉefe eksperimenta fazo... Kiu vidis ankaŭ gravajn muzikeventojn kiaj KEF, UK kun grava investo de la Bialistikaj artistoj per la *Verda disko*, IJK kaj FESTO. Sen forgesi ke EUROKKA/*Vinilkosmo* estis premiita per la premio Onisaburo Deguĉi pro sia agado per muziko por la paco kaj solidareco...

Ĉio ĉi stimulis kaj tiklis la Esperanto-muzikkulturon kaj ebligis lanĉi instigojn kaj novajn projektojn por la sekva jaro.

Pro tio ankaŭ 2010 anoncas sin kiel abunda jaro por Esperanto-muziko kaj muzikprojektoj kiuj dormis aŭ estis en preparo; ili reaktiviĝis, ekzemple, la *Afrika kompilo* kiu estis relanĉita per la preparado de Kongaj artistoj (Denizo Rock Tamba, Viktor Lufimpu kaj Junior Nngangu) kunigitaj sub la nomo *Konga Espero* kaj danke al la kunlaborado inter Théophile Mayoma Diankembo kaj JoMo. La *Afrika kompilo* finprepariĝos en la studio de *Vinilkosmo* en februaro 2010.

Ankaŭ Eterne Rima vekiiĝis kaj dek jarojn post sia unua repa demo-albumo neniam eldonita *Finfine* decidiĝis eldoni hiphop-krunk-albumon *Samideano* aperonta ĉe *Vinilkosmo* printempe 2010.

Eterne Rima vekiiĝis en Tokio.



Kulturo

*Dolchamar* kiu ĵus memeldonis plurlingvan albumon, interkonsente kun *Vinilkosmo* preparas sian trian tutesperantan albumon *Trajn' nenien*, ankaŭ ĉi-printempe.

La itala grupo *Rêverie* ĉi-jare finpreparos sian tutesperantan albumon, same kiel Zhou-Mack kaj *Krio de Morto*, ankaŭ *Inicialoj DC*.

La nova versio de la Hiphopa kompilo *HHK Vol.1* + prezentos du novajn titolojn (kun la jam fama *JES JES JO* laŭdante pri la nova novjara junulara rekontiĝo JES kaj FESTO) fare de Platano (de *La Pafklik*) kaj Emĉjo de *Azaŭak*.

Grava projekto por reeldono de la disko de kantoj de Georges Brassens kantitaj de Jacques Yvart ĵus startis per tradukado kaj adaptado de novaj Brassensaj kantoj kiuj estos aldonitaj al la jam ekzistantaj por pli ampleksa albumo, sed ĝi verŝajne aperos pli malfrue kaj estos prezentata en Sète je Pasko 2011.

Ne eblas fini sen paroli pri la ambicia projekto *Ĝenerala Kanto* (Canto General) starigita de Franjo, la korusestrino de *Meven*. Temas pri fama verko de la Ĉilia poeto Pablo Neruda, ĥora kaj instrumenta epopeo pri liberecaj kantoj de la sudamerikaj civilizacioj, kun muziko de la greka komponisto Mikis Theodorakis. Franjo turneas tra la tuta Francio por laborigi kaj trejni la diversajn ĥorgrupojn, partoprenontajn la projekton. Premiero de tiu ĉi granda spektaklo kun preskaŭ 100 korusanoj okazos dum la SAT-Amikara kongreso en Hiliono (Bretonio) je Pasko 2010, eventuale ankaŭ en la 95a UK en Kubo. En Hiliono la koncerto estos registrita vive por eldoni albumon de tiu grandioza verko ankoraŭ neniam prezentita en Esperanto.

Elstara muzika programo ankaŭ estas antaŭvidata por FESTO, okazonta dum aŭgusto en Tuluzo...



La jaro sin anoncas bunta kaj riĉa je Esperanto-kulturaj kaj muzikaj eventoj ĉie. Ideoj, originaleco, aŭdaco, persisto, projektoj vikle ŝprucas el la Esperanto-artistoj. Tio vivigos la Esperanto-muzikkulturon en 2010 pli ol iam ajn...

Evoluo, diverseco, ŝanĝiĝoj, plivastigo, k.s. estas faktoj kiujn Esperanto-muziko spertas nuntempe. Tio povas signifi, ke komenciĝas nova mutacia periodo por Esperanto-muziko, kiu grave influos ĝian estontecon...

Ni restu vekaj...

*Flo!*

## Novtipaj albumoj rete disponeblaj



## Beletra Almanako, 2009, №6

Jam la trian fojon *BA* publikigas premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj de UEA. Ĝustio plaĉas ne al ĉiuj legantoj, pro tio estiĝis nova rubriko *Debatoj*, en kiu parolas la legantoj, krom la konkursoj ankaŭ pri revuoj kaj poezio.



Tiu ĉi *BA* estas ekskluzive originala, sen tradukoj. Ĝin malfermas prozaĵo *Niaj fantomoj* de Tim Westower. Mauro Nervi artikolas pri la Akademio Literatura de Esperanto kaj Jorge Camacho pri *Ordinaraj viktimoj de l' militoj*. Paul Gubbins en *La sonĝo de la kursgvidanto* — 50-jaraĝa pledas por kongresa uzado de riĉa drama heredaĵo origine Esperanta. Ana Monero rakontas pri la starigo de la biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio, kreado de ĝia katalogo, evoluigo de retaj servoj. Sten Johansson revuas dudek ses jarojn de *Fonto. Lingvo kaj literaturo en Andalusio* estas teksto de prelego, prezentita de Ricardo Albert Reyna en Kordovo novembre 2008.

Bjørn A. Bojesen recenzas la K-diskon *Fek al Esperanto* de *La Pafklik*. Li ankaŭ analizas la romanon de Anna Löwenstein *Morto de artisto*.

Post la rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA 2009, sekvas premiitaj verkoj. En proza branĉo *Viola* de Julia Sigmond kaj *Ranoj* de Sten Johansson. En la poezia branĉo eminentas Nicola Ruggiero kun *de tiu ĉi ĝarden' Narnia* kaj *Esja*, Jean-Marie Ries kun *Tro rapide* kaj Folke Wedlin (premio “Juna Talento”) kun *Ĥodapro: En tarda sorpotempo*.

Lena Karpunina eseeas pri la Esperanto-literaturo, ĝiaj legantoj kaj eldonejoj; *Lingvo kaj dialekto* estas esea temo de Geraldo Mattos. Ambaŭ premiitaj teatraĵoj ririgardas en pasintecon: *Papilio* de Luiza Carol kaj *Preludo de la milito* de Lena Karpunina. Kompletige aperas la raporto de la prezidanto de BK, Humphrey Tonkin, kiu resume prezentas ne nur statistikon pri la konkursoj, opiniojn de juĝ-komisionanoj, sed ankaŭ pledas por “sinklerigo pri la kulturaj produktoj en Esperanto”.

Tiun ĉi eldonon de la *Beletra Almanako* ornamas tolbildoj de Amparo de la Sota.

## Nepraĵo por daŭrigaj studoj

Schmidt, Johann. *Volapük-Bibliographie* / Neu herausgegeben und mit einem Vorwort versehen von Reinhard Haupenthal. — Saarbrücken: Edition Iltis, 2008. — 75 p. — (*Schriften zur Esperantologie und Interlingvistik; Heft 5*).

Laŭ Tazio Carlevaro estas la komuna sorto de la planlingvoj formorti kaj malaperi. Restas tamen ilia historia substrato en formo de libroj kaj revuoj. La tasko de la historia interlingvistiko estas indiksi kaj registri ĉi substraton en formo de bibliografioj. Carlevaro kaj Haupenthal tion faris por la planlingvo Ido.

Antaŭ mi kuŝas plena (pli-malpli) bibliografio de Volapük kompilita de unu el la plej profundaj esploristoj de la lingvo de Schleyer: la germana muzikisto Johann Schmidt (1898–1977) kiu posedis la plej grandan kolekton de Volapük-materialoj.

Schmidt dupartigis sian verkon: en la monografia parto li kunigas 941 erojn, en la parto pri revuoj 124 erojn. Por realigi sian laboron li uzis la stokojn de la propra biblioteko, sed traserĉis ankaŭ librojn menciitajn en revuoj. Ĉefe rilate ĉi lastajn liaj indikoj estas ofte mankohavaj, kaj la ortografio de nomoj kaj titoloj lingve fremdaj por Schmidt disfoje lamas. Malgraŭ ĉi difektoj kaj mankoj neniu serioza interlingvisto povas ignori la pioniran verkon de Schmidt. Sur ĝi baziĝas eĉ la Volapük-bibliografio de Haupenthal kiu, laŭeble, aldonis bibliotekajn trovlokojn.

Eĉ supraĵa trarigardo montras, ke la grandan plimulton de la Volapük-presaĵoj konsistigas lernolibroj, propagandiloj kaj vortaroj, multe malpli abundas tradukoj, preskaŭ mankas originala beletra.

La enkonduko de Haupenthal resumas la aktualan staton de la “volapükologio” kaj ĝin dokumentas per kvarpaĝa (p. 5-8) bibliografio. La verkon aperintan kiel n-ro 5 en la nova serio de la eldonejo “Broŝuroj pri esperantologio kaj interlingvistiko” devus akiri sciencaj bibliotekoj, ĉar por daŭrigaj studoj ĝi estas nepraĵo.

Didier Lesage

Anatolij Sidorov volas aĉeti la libron *Esperanto en Perspektivo* (1974).

✉ 192242, Sankt-Peterburg, ul. Belgradskaja, 10/3-27

✉ [anasido@gmail.com](mailto:anasido@gmail.com)

Halina Gorecka

## Japania Esearo

*Japania Esearo*. N-ro 4 / Red. Syozi Keiko. — Tokio: Libroteko Tokio, 2008. — 98 p.

Post kvin-jara paŭzo *Libroteko Tokio* aperigis la kvaran volumon de la libroserio *Japania Esearo*, lanĉita en 1994.

Konsiderante, ke la ĉefa celo de tiaj libroj estas helpi al alikultura legantaro pli bone kompreni realaĵojn de aliaj landoj, montri deinterne ties vivon, la *Japania Esearo* sukcese realigis la taskon. Pli ol duono de ĉi-volumaj aŭtoroj liveris siajn verkojn por la antaŭaj libroj de la serio. La volumo konsistas el 13 eseoj dividitaj je 2 partoj. Tiuj el la unua parto priskribas diversajn facetojn de nuntempa japana vivo — de protesto kontraŭ la plifortiganta militismo (eseoj 1 kaj 2) ĝis rakonto pri populara speco de la japana humura teatraĵo *Rakugoo* akompanata de vere ridinda ekzemplo kun plensence japaneca sapor (eseo 5). La eseoj el la dua parto estas ligitaj kun Esperanto; ili koncernas primovadajn aferojn en Japanio kaj Azio aŭ tuŝas teoriajn demandojn de la lingvo.

Mi elektis kelkajn eseojn por pli detala priskribo.

Kiel supre menciite, la temo de la du komencaj eseoj estas kontraŭmilitisma agado en Japanio. En la unua eseo Huzimaki Ken'iti rakontas kiel li, posedanto de negranda entrepreno, ĉiujare dum impostpago forigas 6% de pagenda sumo, kio estas proksimume tiom, kiom Japanio elspezas ĉiujare el sia buĝeto por sia armeo. Do, li simple rifuzas pagi sian parton de tiu mono. Tiu ago estas akompanata de letero skribita al la loka impostoficejestro, kie li argumentas sian decidon. Ĝi baziĝas sur la 9a artikolo de la Japania konstitucio malpermesanta al la lando havi armeon sed nur memdefendan korpuson. Li detale priskribas la malavantaĝojn kaj danĝerojn de la senĉesa armigado, kio tute ne sendanĝerigas la landon, sed male kondukas al kresko de armeelspezoj de najbaraj landoj. Tiu, laŭvorte de la aŭtoro, "mikroprotesto" donas bonan ekzemplon kion povas fari simpla homo por la solvo de tiu vere grava problemo de la tuta homaro. La dua eseo rakontas pri landskala movado de "Societo de la 9a artikolo" kiu ankaŭ akcelas bremsi la dezirojn de la Japania registaro nuligi tiun punkton de la konstitucio, kiun oni traktas kiel simbolon de Usona supereco



altruditan postmilito. Tiuj du eseoj iusence detruas la kliŝon pri leĝobeemaj japanoj.

Ankoraŭ unu kliŝon (almenaŭ de mi) detruas eseo de Isikawa Tiekio pri lastatempaj skandaloj ligitaj kun manĝoproduktado en Japanio: jen unu firmao uzas difektiĝantan viandon por siaj produktoj kaj gvidas tiajn aĉaĵojn ĝia ĉefdirektoro, jen alia firmao vendas siajn manĝaĵojn kun malĝusta produktodato kaj uzas degeligitajn produktojn anstataŭ la freŝajn ktp. Aspirante al pli kaj pli granda profito, produktoj ne hontas uzi diversmanierajn ruzaĵojn. Ĉu vere nia mondo tiagrade difektiĝas? Por multaj homoj el diversaj landoj "japana" signifas "bonkvalita", almenaŭ tiel estis antaŭnelonge. Kien, do, ruliĝas nia mondo se eĉ en Japanio okazas tiaj figoj!?

*Layla, Lisa kaj Kitty* de Tahira Masako unuavide ne tuŝas monskalajn problemojn sed estas iom sentimentala kaj ege kortuŝa kaj trista rakonto pri la rilatoj inter homoj kaj katoj. Se necesus elekti de la libro plej bonan eseon, mi donus sian voĉon ĝuste al tiu.

Eseo de Kitagawa Hisasi el la dua parto prezentas rememorojn pri la unua komuna seminario de junaj japanaj kaj koreaj esperantistoj en 1982. Li priskribis la impresojn de loĝanto de industrie tre evoluinta lando pri la ripozo en kampara regiono de Koreio, pri sperto de reciproka interkompreno: "... mi mem sentis min pli kaj pli malfermita al la aliaj. Ĉia mensa singardemo kontraŭ unuafoje renkontitaj alinacianoj degelis for". Dum tiu evento okazis diskutado pri antaŭnelongaj eventoj de Japanio-Korea historio, nome: la mondmilito kaj okupacio kaj provo de Japania edukadministerio falsi la veron pri tio en la lernolibroj. La aŭtoro skribas: "Neniu alia grupo de japanoj kaj koreoj ekster la vicoj de esperantistoj ŝajne kuraĝis entrepreni similan provon... Kaj kion ni atingis post la diskutado! Ne ian formalan konkludon kun grandaj frazoj, nek rezolucion... Kaj tamen, post la diskutado eble balbutema sed certe serioza... ni ja sukcesis atingi ion laŭ mi multe pli esencan... tio estas reciproka transnacia konfido inter ni ĉiuj seminarianoj". La ĉefa ideo de tiu eseo estas ke la interkomprenemo kaj bonaj rilatoj inter simplaj homoj en tiu la plej "malsupra" nivelo pli gravas por la paco en nia "komunloĝejo" ol ĉiuj multekostaj konferencoj de altrangaj mondaj elituloj.

Fine malgranda riproĉo al la eldonistoj pro neregula latinigado de la japanaj propraj kaj geografiaj nomoj. Laŭdindaj estas ekzemploj de uzado de "Esperantaj" ĉapelitaj literoj, kio ebligas al scivolema alilanda leganto ĝuste ilin prononci. Tamen iam eĉ en la sama eseo uziĝas kelkaj sistemoj de transskribo de la sama japana silabsigno, ekzemple: *shi, si; cu, tu; hu, fu; ji, zi*. Certe ne ĉiuj silabsignoj estas facile esperantigitaj, sed estus bone tion laŭeble ordigi.

Tio estas ununura negativa rimarko pri la libro kiu certe trovas siajn dankemajn legantojn.

**Nikolaj Penĉukov**

### 300 mil ekzempleroj – senpage

Por efike lanĉi sian serion de 47 romanoj de Jules Verne, la rumana taggazeto *Adevarul* senpage distribuis tra la lando la 13an resp. la 20an de januaro, po 300 mil ekzempleroj de *Dudek mil leŭgoj sub la maroj* kaj de *La mistera insulo*.

Jen eldonkvanto draste supera al tiuj kutimaj en Esperantujo, ekzemple, ankaŭ al tiu de *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* de la sama aŭtoro, eldonita de *Sezonoj* en aŭgusto 2008 en la modesta kvanto 500 ekzempleroj, el kiuj ankoraŭ pli ol cent libroj restas en la eldoneja stoko. Interese, kiom da personoj aĉetus 47-romanon kolekton de Verne en Esperanto?

**István Ertl**



## Literatura konkurso Liro-2009



La juĝkomisiono de la tradicia literatura konkurso *Liro-2009* (Sten Johansson, Aleksander Korĵenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda), organizita de *La Ondo de Esperanto*, ricevis 28 konkursaĵojn de 21 aŭtoroj el 9 landoj: Brazilo, Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kazahŝtano, Ruslando. (Pasintjare partoprenis 36 konkursaĵoj de 26 aŭtoroj el 15 landoj, sed tiam estis kvin branĉoj).

### La rezulto de *Liro-2009*

Originala prozo

Laŭreato: **Jozefo Kiss** (Hungario) pro *Ŝipo sur la Traka maro*.

Laŭdaj mencioj: **Horst Vogt** (Germanio) pro *Grava Tago*; **Mihail Smotrickij** (Ruslando) pro *Kaviaro*.

Originala poezio

Laŭreato: **Svetlana Konjaŝova** (Ruslando) pro “*Mia humoro hodiaŭ estas sple-na...*” kaj “*Ne eblas verki verson...*”

Laŭdaj mencioj: **Neide Barros Rego** (Brazilo) pro *Kial, florbela*; **Elias Antunas** (Brazilo) pro *L' alia*.

Recenzo

La konkurso ne okazis, ĉar neniu recenzo estis ricevita.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. Konforme al la regularo, la organizantoj ĝis la 1a de januaro 2012 havas ekskluzivan rajton publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

**Gratulon al la laŭreatoj!**

**Dankon al la partoprenintoj!**

**Halina Gorecka**

sekretario de *Liro-2009*

## Ricevitaj libroj

Irving, Washington. *Rip Van Winkle*: [Novelo] / Tradukis el la angla Ionel Oneț. — Thaumiers: La KancerKliniko, 2009. — 20 p. — (*La KromKancerKliniko*; №24). — [Donaco de *La KancerKliniko*].

*Japana Esearo*. N-ro 4 / Redaktis Syozi Keiko. — Tokio: Libroteko Tokio, 2008. — 100 p. — [Recenzoekzemplero].

*Jubileo de Esperanto-disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia*: [Fotoalbumo en la ĉina kaj Esperanto]. — [Pekino]: [ĈRI], 2009. — 32 p.; il. — [Donaco de ĈRI].

*Katalogo. Novembro 2009*. — [Antwerpen]: [FEL], 2009. — 48 p., il. — [Donaco de FEL].

Korĵenkov, Aleksander. *Zamenhofologio. Aktualaj problemoj kaj taskoj*: Prelegoteksto. — Kaliningrado: Sezonoj, 2009. — 16 p.; 300 ekz. — (Serio *Sed ne el katedro*; №5). — [Donaco de Aleksander Korĵenkov].

Schmidt, Johann. *Volapük-Bibliographie* / Neu herausgegeben und mit einem Vorwort versehen von Reinhard Hauptenthal. — Saarbrücken: Edition Iltis, 2008. — 75 p. — (Schriften zur Esperantologie und Interlingvistik; Heft 5). — [Recenzoekzemplero].

*Vidindaĵoj de Gdansk* / Tradukis el la pola Henryk Kosicki. — Gdańsk: Departemento pri Promocio de la Urbo, [2009]. — 32 p.; il. — [Donaco de Edward Kozyra].

## Ricevitaj gazetoj

Bazaro. 2009/3; Beletra Almanako. 2009/6; EAB Update. 2010/48; Esperanta Finnlando. 2009/6; Esperanto aktuell. 2009/6; Femina. 2009/20; Ĝenerala Informilo. 2009/157,158; Heroldo de Esperanto. 2009/15; Informa Bulteno. 2009/4; Informilo por Interlingvistoj. 2009/71; Internaciisto. 2009/4; KAE-Informilo. 2010/69; Komencanto. 2009/3,4; La Gazeto. 2009/145; La Merkato. 2009/98; La Movado. 2009/12; La Ondo de Esperanto. 2010/1; La Revuo Orienta. 2009/11; La SAGO. 2009/60; Litova Stelo. 2009/3,4,5; Mikrofono. 2009/27; Monato. 2009/12; Norvega Esperantisto. 2009/6; REGo. 2009/6; Scienco kaj Kulturo. 2009/6; Tempo. 2009/3; Verda Saksofono. 2009/25.

## Gazetoj

### La lasta Bazaro

Per la 50a kajero la redaktorino Julia Sigmond finas sian laboron pri *Bazaro*, esperantlingva revuo en Cluj-Napoca, Rumanio. La adiaŭan kajeron malfermas leteroj de legantoj, inter kiuj David Kelso pripensas la fenomenon “bazaro” ne nur kiel lokon por vendi/aĉeti, sed ankaŭ kiel renkontiĝejon, ne nur de varoj: “La plej grava afero estas ne la budoj, la tabloj, nek eĉ la viando vendata, sed la renkontado, la kunmikso, la interŝanĝado inter ni ĉiuj, el landoj disaj kaj malsamaj. Ni celebri nian bazaron, nian kulturon kaj niajn estontajn interŝanĝeojn!”

Sen Rodin (ps.) recenzas la libron *Esperanto: movado, strategio, estetiko, rakontoj* de Ignat Florian Bociort, rumana lingvisto, nun loĝanta en Germanio. Ionel Oneț raportas pri ekspozicio, dediĉita al la centjariĝo de Esperanto en Rumanio, aranĝita en malgranda urbo Slatina. Pri naturmedio meditas Rita Rössler-Buckel en *Postrikolto* kaj Francesco Maurelli en *Naturmedio laŭ vegetarano vidpunkto*. Amuzan vivepizodon rakontas Fabrizioo A. Pennacchietti en *Dujulajkm?* Sen Rodin kaptas atenton per rakonto pri siaj librosendaj aventuroj en *Honesteroj en poŝtejo*. Enestas kelkaj movadaj informoj; Julia Sigmond raportas pri siaj kongresaj travivaĵoj en Bjalistoko.

Kelkaj popolfabeloj prezentiĝas traduke, ĉeestas prozaĵoj (*Blondulino* de Adrienne Pásztor) kaj vivrakontoj (Johano Balczer, Paula Tytgat, Franz-Georg Rössler, sac. Lajos Kóbor), poezio (Luiza Carol, Baldur Ragnarsson, Imre Szabó, Armando Zecchin k.a.), ankaŭ tradukitaj beletraĵoj. Éva Farkas-Tatár priskribas sian vivon kaj Esperanto-aktivadon kiel radia parolisto kaj instruisto. Geraldo Mattos en *Embaska lingvo* analizas erarojn, kiuj ŝuldiĝas al la imito de niaj unuaj lingvoj.

Oni admiru la viglan aktivadon de la 80-jara Julia, kiu intencas aperigi literaturan antologion de originalaj verkoj (prozo, poezio, eseoj, teatraĵoj) de rumaniaj esperantistoj.

**Halina Gorecka**

**Ne forgesu  
(re)aboni!**

Por la decembra krucvortenigmo venis 11 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Malcolm Jones (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Dorota Burchardt, Antoni Gradek, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando), Klara Ilutoviĉ, Svetlana Konjašova (Ruslando), Keneĉjo Goldbergo (Usono). La ĝusta respondo estas: *Ragnarsson*.

La loto donis libropremion al **Jackie Huberdeau**. Ni gratulas ŝin!

## Malnovaj taskoj

Multaj ŝatis la faskon da malnovaj taskoj, kiujn ni publikigis en la novembra *Ondo*. Jen plia porcio de enigmoj, kiuj aĝas preskaŭ cent jarojn.

1. Kiu havas dentojn, sed ne suferas pro dentodoloro?
2. En la malplenaj kvadratoj oni enskribu literojn tiel, ke la horizontalaj vicoj nomu: 1) problemon, 2) kolorigilon, 3) denuncon, 4) muzikmaŝinon.

en			
	en		
		en	
			en

3. Sen du lastaj literoj min havas ĉiu homo, sen la du unuaj — ĉiu reĝo, kaj la tuton — ĉiu subulo.
  4. Sen karno, sen ostoj, sed havas kvin fingrojn.
  5. Kun “g” mi estas fiŝo, kun “n” — birdo, kun “d” sen la unua litero — ankaŭ birdo.
  6. Solvu kvazaŭ matematikajon:  
$$a - b + c - d = x$$
(a — besto, b — prepozicio, c — cifero, d — konjunkcio. La ricevota x estas sovaĝa besto).
  7. Kio staras inter monto kaj valo?
  8. La divenota vorto estas besto. Anstataŭu en ĝi unu literon, kaj vi ricevos objekton, kiun vi nun vidas.
- La respondoj venu al la redakcio antaŭ 15 mar 2010.

## Juda humuro

### Ĝoju kaj festenu, sed malriĉulojn subtenu?

Malriĉa juda vilaĝano veturis al la granda urbo. Tie li venis al la hejmo de sia riĉa parenco kaj petis de li monhelpon. La parenco donacis al li grandan monsumon sed tuj diris al li: “Mi petas vin reveni nur kiam okazos ĉe mi granda ĝojfesteno!”

La judo foriris sed post kelkaj horoj revenis.

*Riĉulo*: “Sed mi petis de vi reveni nur kiam okazos ĉe mi ĝojfesteno!”

*Malriĉulo*: “Jes, sed dumvoje mi ekpensis, ke nun vi kaj via edzino ĝojfestas pro tio, ke mi foriris kaj ne restis ĉe vi por la nokto, do mi decidis reveni...”

### Kie la judoj ploras

Al usona judo vizitonta Israelon, amiko konsilis viziti en Jerusalemo la Okcidentan Muron (Muro de Ploreĝo), “kie la judoj ploras”.

Veninte en Jerusalemo la turisto forgesis la nomon de la loko. Li haltigis taksion kaj diris al la ŝoforo: “Bonvolu veturigi min tien, kie la judoj ploras”.

Ili ekveturis. Antaŭ la impost-oficejo la ŝoforo haltis.

El la kolekto de **Josi Shemer**

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

### el la kolekto de reduktoro

#### Tre fera prefero

... ni preferas sinceran faŝiston al politika indiferentulo: ĉar almenaŭ tiu havis la kuraĝon fari elekton, eĉ se eraran... (Giorgio Silfer, membro de Scienca Instituto Dietterle. *Universalaj Kongresoj en totalismaj landoj* // HeKo 419 1-A, 17 jan 2010, <http://www.esperantio.net/index.php?id=1130>)

#### Civito: Ĉu havi aŭ ne esti?

Alia mispercepto [pri la Esperanta Civito] fontas el la kutimo difini la homojn laŭ la kategorio “esti” <...> Ni transiru al nova formulo, laŭ la kategorio “havi”. (Giorgio Silfer. *Se la revolucio ekas per la vortoj* // HeKo 405 3-C, 1 okt 2009, <http://www.esperantio.net/index.php?id=1006>)

#### Poloj nun sen malbonvolo

Tio signifus, ke la esperanto-redakcio de Pola Radio nuntempe konsistus nur el bonvoluloj. (*Pola Radio fermis sian monujon* // HeKo 410 9-A, 28 nov 2009, <http://www.esperantio.net/index.php?id=1057>)

#### Verduloj interpunkcios

Por fari la punkton <...> la senatanoj de la Verda grupo estas kunvokitaj al la dua publika asembleo de la Nova Maldekstro en Esperantio. (Sen. Walter Ŝelazny. *Publika asembleo de la Nova Maldekstro* // HeKo 394 6-C, 29 jun 2009, <http://www.esperantio.net/index.php?id=908>)

#### C-ino en kortu-manoj

... c-ino Agneta Emanuelsson (...) ĵuris lojalecon al la Konsitucio [tiele], en la manoj de kortumano Andrés Martín. (*La Senato bone laboris en Bruselo* // HeKo 362 7-C, 25 jul 2008, <http://esperantio.net/index.php?id=612>; rimarkis Kalle Kniivilä)

#### Ĉu blino aŭ balano?

Ĉi tiu laborblano baziĝas sur la statutaj celoj, kiuj konsistigas la framon de referenco por la agado de MEF. (*Laborplano de Meksika Esperanto-Federacio* // HeKo 352 2-B, 29 apr 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=541>)

#### Manuskripto praktike kristanas

Endre Dudich aŭtoris librojn pri (popular)scienco, interalie *Ĉu ni* [fakte: vi. — I.E.] *konas la Teron?*; praktikanta kristano, lia iom ĝeneraleca manuskripto pri historio de filozofio atendas eldononton. (*Azia UK sen afrika reprezentanto* // HeKo 335 9-A, 5 aŭg 2007, <http://www.esperantio.net/index.php?id=388>; notis Kalle Kniivilä)

#### Ligna lingvaĵo

Dum dua kunveno venis lato reprezentanto de komunistarta partio el Milano... (Dieter Rooke. *Kunveno de Komunistarta Frakcio de SAT* // *Internaciisto*, 2009, №4, p. 15; rimarkis Ionel Oneț)

Kunplukis **István Ertl**

Mi kore dankas al la multaj samideanoj, kiuj gratulis min okaze de mia elekto kiel la *Esperantisto de la Jaro*. Viaj gratuloj instigas min al plua laboro.

**Aleksander Korĵenkov**

## Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

**Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest  
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

**Pollando:** PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

**Portugaliao:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



La 19an de decembro la esperantistoj de Kantono (Ĉinio) en sia asocia sidejo festis la jubileon de d-ro Zamenhof. Prelegis kaj salutis la asocia prezidanto s-ro Ling, aktivulo Petro Ye kaj instruisto Augusto Casquero. Poste oni fotiĝis kaj en amikeca etoso iris al restoracio por bankedo. (*Li Fei / Augusto Casquero*)



Inter la 194 partoprenantoj de la 8a Novjara Renkontiĝo de EsperantoLand (vd. p. 14) estis 56 infanoj ĝis 14 jaroj, kiuj ĝuis la programon kun manlaboro, ludoj, prezentadoj, lernado de pupteatro, kaj per Esperanto interkonatiĝis kaj amikiĝis kun ali-landaj samaĝuloj. (*Lu Wunsch-Rolshoven / Katalin Kováts*)



Ĉi-vintre esperantistoj de Germanio kaj Pollando unuafoje festis komune la Zamenhofan Tagon en speciala eventaro, kiu daŭris dum tuta semajno en Berlino (vd. p. 10). Malgraŭ la frosto kaj densa programo, grupeto da pollandaj samideanoj vizitis la ĉi-somere inaŭguritan parkon Zamenhof. (*Eduardo Kozyra*)



# Internacia Fotokonkurso

“La Ondo de Esperanto” organizis en 2009 la 12an Internacian Fotokonkurson. Partoprenis 65 verkoj de 14 aŭtoroj el 11 landoj: Brazilo, Ĉilio, Ĉinio, Hungario, Germanio, Italio, Kanado, Pollando, Rumanio, Ruslando, Serbio.

La 9an de januaro 2010 la juĝkomisiono anoncis la rezulton.

1a premio (50 eŭroj kaj abono al “La Ondo de Esperanto”): Barbara Chodera (Pollando) pro “En bicikla speguleto” (la supra foto).

2a premio (25 eŭroj kaj abono al “La Ondo de Esperanto”): Xu jing ke (Ĉinio) pro “Rivero sub la lunbrilo zigzagas”.

3a premio (abono al “La Ondo de Esperanto”): Joaquim João Mariano (Brazilo) pro “Disĵetita akvofalo”; Geoffrey Greatrex (Kanado) pro “Eiĥŝtata klostro”; Vladimir Merkulov (Ruslando) pro “Korteto en Montenegro”.

Laŭdaj mencioj: Lenke Szász (Rumanio); Iván Mättig Catalán (Ĉilio) pro “La hieraŭo reflektita en la hodiaŭo”.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono al “La Ondo de Esperanto”) pri la temo *Infanoj*: Vilhelmo Arnold (Serbio).

Laŭdaj mencioj: Joaquim João Mariano (Brazilo) pro “Infana rideto”; Zhang Yilan (Ĉinio) pro “Gaja rajdosoldateto”.

*Dankon al la partoprenintoj! Gratulon al la laŭreatoj!*

Halina Gorecka  
sekretario de la konkurso